

# **LEGOLIBRETO V.**

**El E-eretoj kolektitaj el diversaj lokoj por karaj amikoj ni preparis tiun ĉi Legolibreton jam kvinan en la vico.**

**Ĝi ne pretendas ian profesion sperton, nur volas doni ion por legi kaj amuzi.**

**Estu indulgema al mia laboro**

**Jindřiška Drahotová**

## **Kiu mi estos en venonta vivo**

En mia samtempa vivo mi estas virino.

En mia venonta vivo mi deziras esti urso. Se oni estas urso, oni vintre dormas. Oni faras nenion, nur dormas dum ses monatoj. – *Tion mi eltenus.*

Antaŭ ekdormo oni multe manĝegas. – *Tion mi povus klopodi.*

Se oni estas ursa ino, oni naskas idojn dum la dormo kaj la idoj estas grandaj, pli bone dirite malgrandaj, kiel juglando kaj kiam patrino vekigigas, la idoj jam estas memstaraj kaj amindaj por dorloti. – *Tion mi certe ĝuis.*

Kiam vi estas ursino, ĉiu scias, ke vi kondukas tute serioze. Tiu, kiu mokus aŭ danĝerigus viajn idojn, tiu estus severe punita kaj kiam la idoj tro petolus, estus per piedmanego ankaŭ punitaj de patrino. – *Tion mi povus.*

Kiam vi estas ursino, via partnero ne surprizas, ke vi matene grumblas. Li ankaŭ konsentas, ke viaj piedoj estas vilaj kaj viaj grasaj lardoj estas sufiĉe grandaj.

*Jes, mi pensas, ke mi estos urso!*

Laŭ anonimino el interreto tradukis Eva Novotná.

## **Sinjinorino el Valečov**

Legendo el Ĉeĥa paradizo en Bohemio

Bieno Valečov troviĝas en regiono fekunda kaj riĉa. En tempo de la plej granda gloro ŝanĝiĝadis ĉi tie multaj estroj. Plejparte tio estis bonaj kaj justaj sinjoroj. Sed de tempo al tempo kelkfoje venis eĉ rabistoj.

Iu sinjinorino el Valečov estis tro avara kaj kaptis ideon, kiel gardi sian stokon de moneroj. Ŝi luis homojn por fosi subteran koridoron. En tiu ĉi koridoron ŝi volis kaŝi siajn trezorojn kaj juvelojn. Post kelkaj monatoj estis ĉio preta. Sinjinorino invitis subulojn al festeno. Kiam estis ĉiuj ebriaj, ŝi firme fermis pordojn kaj la lignan konstruaĵon ekbruligis. Sed la konscienco tre ege turmentis ŝin, ĝis ŝi frenezigis. Ŝia nigra animo eĉ nun promenas en lokoj de tiu trezoro. Kie estas la trezoro kaŝita, scias neniuj. Eble vi, se vi vizitos Ĉeĥan paradizon, havos feliĉon trovi la trezoron..

El fabela gvidlibro de boleslava regiono (Pohádkový výletník Mladoboleslavska)  
tradukis Zdena Baboráková

## **Anekdoto de Karel**

Filino revenis de junulara kongreso, kaj la patro alportis ŝin hejmen de la flughaveno per aŭto. La filino silentis dum la tuta veturado kaj ŝia patro demandis: "Filino, kio maltrankviligas vin? Vi povas diri al mi pri io ajn."

"Kara Paĉjo, mi ne plu estas virgulinon."

La patro suspiris kaj diris, "Mi elspezis tiom da mono por sendi vin al Esperantaj kunvenoj kaj vi ankoraŭ ne uzas ĝuste la akuzativon!"

## **Junuloj legu kion pri juneco opinias maljunuloj**

Herbert Henri Asquith: „Estus juneco plene ideala stato, nur se ĝi venus en la vivon pli malfrue.“

Oskar Wilde: „Por akiri mian junecon mi farus ion ajn, nur krom skribado de taskoj, frua matena ellitiĝo kaj respekto al aŭtoritatoj.“

George Bernard Shaw: „Juneco estas belega afero. Estas krimo malŝpari ĝin por infanoj.“

Coco Chanel: „Juneco estas io nova, antaŭ dudek jaroj neniu pri ĝi eĉ parolis.“

Irlanda proverbo: „Laŭdu junecon kaj ĝi floros.“

Albert North Whitehead: „La plej preciza difino de la juneco estas vivo, kiun tuŝis nenia ajn tragedio.“

Marlene Dittrich: „Virinoj deziras esti fidelaj. Sed problemo estas trovi viron, al kiu oni povus esti fidelaj.“

## **Astrid Lingren kaj ŝiaj verkoj**

Kerstin Rohdin, Svedujo

Pipi Ŝtrumpolonga renversis la mondon de la infanoj. Tiu libro aperis en la jaro 1945 kaj estis premiita en konkurso de la tute nova eldonejo Rabén & Sjögren. Tiu libro donis al la tro edukitaj infanoj defendon kaj ĝojon.

Astrid Lindgren diris, ke kiam ŝi fariĝis patrino, ŝi rimarkis, ke la gepatroj ne ofte aŭskultas al la infanoj kaj ke ili edukas ilin per kvereloj kaj batoj. Tiu sento eĉ pli fortiĝis, kiam la infanoj komencis viziti lernejon.

La libro pri Pipi estas plena de ribelado kontraŭ aŭtoriteco. Pipi neniam fariĝos plenkreska (eble same kiel Astrid Lingren, kiu neniam skribis pri si mem kiel pri plenkreska).

Dum la tridekaj jaroj la anglo-saksa pedagogia literaturo pli kaj pli atingis Svedion. Ok el la libroj de Bertrand Russel estis tradukitaj, kaj liaj ideoj estis pli kaj pli diskutitaj en ĉiutagaj gazetoj kaj revuoj. La kampo estis plugita por la rajto de la infanoj, ke oni traktu la infanon per respekto.

Rakonto pri kiel Pipi „naskiĝis“ estas jena: „Iam mia filino longe kuŝis malsana en la lito kaj ŝi petis min: Rakontu, rakontu pri Pipi Ŝtrumpolonga. Kaj mi faris tion, kaj pro tia stranga nomo mi devis trovi strangajn eventojn en la rakonto. La geamikoj de mia filino ankaŭ tre ŝatis la rakontojn. Antaŭ kristnasko iun jaron mi falis kaj puŝdifektiĝis mia piedo. Por okupi la tempon en la lito mi manskribis la rakonton pri Pipi por doni en bela kajero al mia filino kiel donaco por la deka naskiĝtago.“

Poste Astrid Lingren sendis la manuskripton al la granda eldonejo Bonniers, kiu rifuzis ĝin. Venontan jaron la alia eldonejo Rabén & Sjögren organizis konkurson kaj Astrid Lingren gajnis la duan premion. La Rabén & Sjögren poste eldonis ĉiujn librojn de Astrid Lingren kaj oni povas imagi al si, ke Bonniers ploris multajn larmojn pri sia nesufiĉe klara antaŭvido. Dum „la ora tempo“ de la sveda porinfana literaturo (50-aj – 70-aj jaroj) Astrid Lingren laboris kiel redaktoro ĉe R&S.

Unue la libro pri Pipi ricevis multege da laŭda kritiko, sed post iom da tempo profesoro John Landquist tre forte atakis la libron dirante, ke ĝi estas malmorala, sennorma, nenormala kaj malbona

ekzemplo por la infanoj. Dum unu – du jaroj ekestis tre forta kaj eble necesa debato en gazetaro por kaj kontraŭ la nova pedagogiko kaj „libereco“ de infanoj. En la literatura revuo BLM oni skribis: „Se infanoj devis kreski en socio, kiu tiel morale reagis kontraŭ tiaj sendanĝeraj ludoj, tiam vere la infanoj bezonas librojn kiel Pipi por elteni.

La instruistoj estis la grupo, kiu plej forte kaj plej longedaŭre estis kontraŭ Pipi kaj la „libereco“ de infanoj.

Sed imagu, kiam mi estis en la kvara klaso, ni havis tre maljunan instruiston pri la geografio. Li laŭtleĝis la tutan libron pri Pipi. Kaj ni neniam lernis la geografion pri Svedio!

Pipi konkeris la mondon per tradukoj en 60 lingvojn, per filmoj, per teatraĵoj kpt. En Esperanton tradukis la libron Sven Alexanderson, esperantisto el Stockholmo. Bedaŭrinde li mortis tuj kiam li fintradukis la libron.

Astrid Lingren verkis en la jaroj 1944 – 1973 dekojn da libroj. Inter ili estas „Fratoj Leonkoro“, „Mio mia mio“, „Kajsa Kavata“, „Bullerby“, „Madicken“, „Ronja la filino de rabisto“ kaj „Emilo el Smolando“.

## **La ero el la libro Emilo el Smolando**

Mardon la 22-an de majo, kiam Emilo enigis la kapon en la supujon.

Tiun tagon en Katthult oni manĝis viando-supon tagmeze. Sur la tablo staris la flordeseignita supujo kaj ĉiuj sidis ĉirkaŭ la kuireja tablo kaj manĝis supon. Precipe Emilo ŝatis supon, kaj oni aŭdis tion, kiam li manĝis.

„Ĉu necesas fari tian bruon?“ demandis lia patrino.

„Se ne, oni ja ne scius, ke estas supo“, diris Emilo, sed fakte diris tiamaniere: „Alie oni ja ne scius, ke estas ‘sopo’“. Sed ni neokupiĝu nun pri tiu smolanda dialekto.

Ĉiuj rajtis manĝi kiel ajn multe ili kapablis kaj poste la supujo estis malplena. Restis nur kelkaj gutoj en la fundo. Tiujn gutojn Emilo volis havi kaj la sola maniero havigi ilin al si estis enŝovi la tutan kapon en la supujon kaj ensuĉi ilin. Emilo tion faris kaj oni bone aŭdis kiel li ensorbis la gutojn en la supujo. Sed poste Emilo volis eligi sian kapon kaj imagu al vi, tio ne eblis! Li fiksiĝis. Tiam Emilo timiĝis kaj kuris de la tablo kaj staris kun la supujo ĉirkaŭ la kapo. Ĝi tute kovris liajn okulojn kaj liajn orelojn. Emilo portis la supujon kaj kriis. Ankaŭ Lina ektimis.

„Nia bela supujo“, ŝi diris. „Nia bela, flordeseignita supujo. En kio ni nun havos la supon?“ Dum la supujo estas plena de la kapo de Emilo, oni ne povas surtabligi supon en ĝi, tion ŝi komprenis, kvankam ŝi plej ofte ne komprenis tre multon.

Sed la patrino pensis pli pri li.

„Ho, kara, kiamaniere ni eligu la knabon? Ni devas preni fajrohokon kaj frakasi la supujon!“

„Ĉu vi estas tute freneza?“ diris la patro de Emilo. „Ĝi kostis kvar kronojn.“

„Nun mi provu,“ diris Alfredo, kiu estis forta kaj kapabla kamparano. Li ektenis la du tenilojn de la supujo kaj forte levis la ujon rekte supren, sed tio ne helpis. Emilo leviĝis kun ĝi, ĉar la supujo vere forte fiksiĝis. Kaj Emilo multe penis kaj baraktis per la piedoj por reatingi la plankon.

„Lasu! Remetu min sur la plankon! Lasu min, mi diras!“ li kriis kaj tiam Alfredo lasis lin.

Nun ĉiuj estis tute malgajaj. Ili staris tie en la kuirejo ĉirkaŭ Emilo kaj cerbumadis, patro Antono, patrino Alma, eta Ida, Alfredo kaj Lina. Neniu povis ekpensi bonan manieron liberigi Emilon el la supujo.

„Rigardu, Emilo ploras,“ diris eta Ida kaj fingromontris al kelkaj grandaj larmoj, kiuj elfluis de sub la rando de la supujo kaj malrapide rulis laŭ la vangoj de Emilo.

„Mi ne ploras,“ diris Emilo, „estas viando-supo.“

Li sonis obstine kiel kutime, sed ne estis tre agrable fiksiĝi en supujo, kaj imagu, se li neniam liberiĝos! Kompatinda Emilo kiam li do portos sian „ĉepon“?

La patrino tiel kompatis sian knabeton. Denove ŝi volis uzi la fajrohokon por frakasi la supujon, sed la patro diris: „Absolute ne! Tiu ujo kostis kvar kronojn. Pli bone, se ni iru al la kuracisto en Mariannelund. Li certe povos forpreni ĝin. Cetere li postulos nur tri kronojn, kaj tiel ni gajnos unu kronon.“

La patrino de Emilo opiniis, ke tio estas bona ideo. Ne ĉiun tagon oni povas gajni unu kronon. Imagu, kiom da agrablajoj oni povas aĉeti por tio, eble ion por eta Ida, kiu devos resti hejme, dum Emilo ekskursos al la kuracisto.

Nun estas granda hasto en Katthult. Oni devis purigi kaj ordigi Emilon, lavi lin kaj surmeti al li liajn plej bonajn vestojn. Oni ja ne povis kombi lin, eĉ ne lavi orelojn, kvankam tio estis tute necesa. Lia patrino tamen provis enigi sian montrofingron sub la rando de la supujo por elgrati malpuraĵojn el la oreloj de Emilo. Sed tio preskaŭ finiĝis katastrofe, ĉar ankaŭ ŝi fiksiĝis en la supujo.

„Vidu kio okazas,“ diris eta Ida, kaj patro Antono grave koleriĝis, kvankam kutime li estis tiel kvieta.

„Ĉu ne estas iu alia, kiu volas enŝovi sin en la supujon?“ li kriis. „Bonvolu fari tion, tiel ke mi povas transporti tutan Katthulton per la granda fojnoĉaro al la kuracisto en Mariannelund.“

Sed la patrino de Emilo forte tiris la fingron kaj liberigis sin. „Ne necesas lavi la orelojn de Emilo,“ ŝi diris kaj alblovigis sian fingron. Tiam oni povis vidi kontentan rideton sub la rando de la supujo kaj Emilo diris: „Tio estas la unua vera utilo, kiun mi havas de tiu ĉi supujo.“

Sed nun Alfredo estis kondukita la ĉevalon al la fronta ŝtuparo kaj Emilo eliris el la domo por sidiĝi en la ĉaron. Li estis belaspekta en siaj striitaj dimanĉo-vestoj kaj siaj nigraj butonaj botoj kaj sia supujo. Eble la supujo kreis nekutiman aspekton, sed ĝi estis flordeseignita kaj bela kaj preskaŭ similis al iu speco de laŭmoda, somera ĉapelo. La sola afero pri kiu oni povis plendi estis, ke ĝi iom tro kovris la okulojn de Emilo.

Kaj nun al Mariannelund.

„Bone gardu etan Idan, dum ni estas for,“ vokis la patrino de Emilo. Ŝi sidis sur la antaŭa benko kune kun la patro de Emilo. Sur la malantaŭa benko sidis Emilo kun la supujo. Kaj lia „ĉepo“ kuŝis apud li sur la benko. Li ja devos porti ion sur la kapo, ankaŭ kiam li revenos hejmen. Kiel bone, ke li memoris pri tio!

„Kion mi preparos por vespermanĝo?“ vokis Lina, ĝuste kiam la ĉaro ekrulis.

„Faru kion vi volas,“ vokis la patrino de Emilo, „mi nun havas aliajn aferojn por pripensi.“

„Ni manĝu viando-supon, do,“ diris Lina. Sed en la sama momento ŝi vidis ion flordeseignitan malaperi en la vojkurbo kaj ŝi memoris pri tio, kio okazis. Ŝi malgaje turnis sin al Alfredo kaj eta Ida.

„Mi pensas, ke ni devos manĝi grasopanon kaj lardon anstataŭe,“ ŝi diris.

Emilo jam plurfoje vizitis Mariannelundon. Kutime li ŝatis sidi alte en la ĉevalĉaro kaj vidi kiel la vojo kurbiĝis kaj rigardi la farmojn, kiujn ili pasis, kaj rigardi la infanojn, kiuj loĝis en la farmoj, kaj hundojn, kiuj bojis ĉe la bariloj, kaj ĉevalojn, kaj la bovinojn, kiuj paŝtis sin sur la paŝtejoj. Sed nun li tute ne amuziĝis. Nun li sidis kun la okuloj kovritaj per supujo kaj povis vidi nur pecon de siaj propraj butonaj botoj, kiuj aperis tra la mallarĝa fendo sub la rando de la supujo. La tutan tempon li devis demandi al sia patro: „Kie ni nun estas? Ĉu ni jam pasis patkuk-farmon? Ĉu ni baldaŭ atingos la porko-farmon?“

La atendejo de la kuracisto estis plena de homoj, kiam Emilo eniris kun sia supujo. Ĉiuj, kiuj sidis tie, tuj tre kompatis lin. Ili ja komprenis, ke okazis akcidento. Nur iu malica maljunulo ridegis, kvazaŭ estus plezuro fiksiĝi en supujon.

„Hohoho,“ diris la maljunulo, „ĉu viaj oreloj suferas pro frostoj, bubo?“

„Ne,“ diris Emilo.

„Se ne, kial vi portas tiun aĵon sur via kapo,“ demandis la maljunulo.

„Se mi ne portus, tiam miaj oreloj suferus pro frostoj,“ diris Emilo. Li ankaŭ povis ŝerci, kvankam li estis eta.

Sed poste Emilo eniris la konsultejon de la kuracisto kaj la kuracisto ne ridis pri li. Li nur diris: „Bonan tagon! Kion vi faras en tio?“

Emilo ja ne povis vidi kuraciston, sed li tamen devis saluti lin, kaj tial li riverencis kiel plej profunden li kapablis kun la supujo sur la kapo. Sonis granda krako. Pan! oni aŭdis, kaj jen la supujo sur la planko frakasita en du partojn. Tiel forte batis Emilo la kapon kontraŭ la skribotablo de la kuracisto.

„Nun ni perdis kvar kronojn,“ la patro de Emilo iom mallaŭte diris al la patrino de Emilo. Sed la kuracisto aŭdis tion.

„Nu, vi tamen gajnis unu kronon,“ li diris, „ĉar mi kutime postulas kvin kronojn, kiam mi elligas knabetojn el supujoj. Kaj nun li mem eligis sin.“

Tiam la patro de Emilo ekĝojis kaj li estis danko al Emilo, kiu frakasis la supujon kaj gajnis unu kronon. Rapide li prenis la difektitan supujon kaj Emilon kaj la patrinon de Emilo kun si kaj foriris.

*Kompreneble la rakontado priskribas la temon pri la supujo ankoraŭ sur sekvaj paĝoj per spritaj gajaj okazoj, ĝis kiam kungluita supujo estas vespere hejme finfine tute frakasita.*

## **Fabelo el Tibeto – La musoj kaj la Reĝo**

El la libro „Faktoj kaj Fantazioj“ – progresiga libro, Marjorie Boulton  
Dua eldono, UEA Rotterdam 1993.

*Tibeto, tre alta lando, kiu situas norde de Himalajo, estas nun aŭtonoma regiono de Ĉinio. Lando pli granda ol Francujo, Svislando, Hispanujo kaj Portugalujo kune, vivtenas malpli ol du milionojn da homoj. (en la supraj kvar eŭropaj landoj kune vivas pli ol naŭdek ses milionoj). Sed la tibeta popolo, en sia montara, malvarma lando, havas propran lingvon, multajn interesajn tradiciojn kaj kutimojn, tre riĉan apartan folkloron.*

*La jena tibeta fabelo estas neordinara kaj amuza. Ĉu ĝi ankaŭ iom montras la absurdan flankon de milito, diplomatio kaj propagando?*

Iam, ie en iu lando, regis reĝo kaj en la lando estis multaj musoj.

Normale la musoj prosperis kaj manĝis sufiĉe, sed venis jaro de malbona rikolto. La musoj, kiuj kutime vivtenis sin grandparte per la greno, kiun la homoj lasis sur la tero post la rikolto rimarkis, ke ĉi-jare la postrikolta greno ne sufiĉos por la tuta vintro. La Reĝo de la Musoj decidis peti helpon de la Reĝo de la Lando.

Kiam la palaca pordisto informis la Reĝon, ke Muso deziras paroli kun li, la Reĝo ekridis, sed ordonis, ke oni enlasu la muson.

La Muso venis respekteme kaj dece en la grandan Aŭdiencan Ĉambron. Ĉar tibetanoj, je formalaj renkontiĝoj al kiuj taŭgas ceremonioj, donacas elegantajn skarpojn, la eta muso portis silkan fadenon, kiun li per la ĝustaj ceremoniaj gestoj ĝentile proponis al la reĝo.

„Mi vin salutas, frato Muso,“ diris la Reĝo. „Kion vi deziras?“

„Ho, Reĝa Moŝto,“ respondis la Muso, „la rikolto estas malgranda; la homoj ne lasis multan grenon sur la tero; ni musoj mortos pro malsato, se ni ne povos pruntepreni stokon por la vintro. Mi petas vian helpon. Bonvolu prunti al ni sufiĉan grenon por la vintro; kaj mi, la Reĝo de la Musoj, solene promesas, ke post la nova rikolto ni plene repagos vin. La enhavo de unu el viaj grenejoj sufiĉos.“

„Kiel vi etaj musoj forportos tiom da greno?“

„Via Reĝa Moŝto, se vi pruntos la grenon al ni, ni povos ĝin forporti.“

„Do, Frato Muso, mi pruntos al la musoj la grenon el unu grenejo, sub viaj kondiĉoj.“ Kaj li ordonis al la respondeca persono, malfermi unu grenejon, kaj permesis al la musoj forporti la grenon.

La Reĝo de la Musoj kunvokis ĉiujn musojn de la lando, cent-miloj da musoj. Ĉiuj iris al la grenejo, metis grenon en la buŝon, sur la dorson, ligis iom da greno per la vosto kaj tia laboro de tiom da musoj kune rapide malplenigis la grenejon. Kiam la Reĝo vidis, kio okazis, li komencis alte estimi la inteligentecon kaj kapablon de la musa popolo, kaj ĝian kunlaboremon.

Post la nova rikolto, la Reĝo de la Musoj plenumis sian promeson, la musoj reportis al la reĝa grenejo la tutan kvanton da greno, kiun ili antaŭe prunteprenis kaj ankaŭ kun interezo. La Reĝo ne plu inklinis ridi je la etaj musoj, ĉar li konstatis, ke la musoj estas ne nur inteligentaj, sed honestaj kaj fidindaj.

Sed baldaŭ la Reĝo havis gravan problemon: milito komenciĝis inter lia regno, kaj najbara regno. Granda rivero fluis inter la du regnoj, kaj ĉe la bordo de la rivero la malamika reĝo jam metis sian tendaron, preta por invadi la landon.

La musoj ne deziris, ke fremda reĝo eble malpli helpema aŭ eĉ kruela, venku ilian Reĝon. La Reĝo de la Musoj tuj iris al la palaco kaj petis aŭdiencon. La Reĝo tuj invitis lin al la Aŭdienza Ĉambro.

„Via Reĝa Moŝto, mi venis denove, ĉi-foje por demandi, ĉu ni povas reciproki vian grandan helpon. Ni metas nin je via dispono.“

Eĉ meze de tiu grava krizo, la Reĝo ne povis kaŝi rideton. „Frato Muso,“ li demandis, „kiel etaj musoj povos helpi min nun? La malamika armeo estas vasta multe pli granda ol la mia. Mi nepre malvenkos. Mi dankas pro viaj bonaj intencoj, sed kiel musoj povos helpi min?“

„Via Reĝa Moŝto, ĉu tamen vi memoras, kiel vi dubis pri nia kapablo forporti la grenon el la grenejo? Kaj kiel vi surpriziĝis, kiam ni repagis nian tutan pruntaĵon? Nur fidu al ni denove; kaj konsentu pri du servoj al nia popolo; kaj per specialaj ruzaj manovroj ni savos vian regnon.“

„Estas vere, ke vi sukcesis pri la du aliaj aferoj,“ la Reĝo konsentis. „Do, kion mi faru?“

„Ordonu al viaj soldatoj, ke ili preparu por ni cent mil bastonetojn, longajn kiel via reĝa piedo, kaj kuŝigu ilin ĉe nia flanko de la rivero, antaŭ la sunsubiro. Ordonu tion, ĉar por tiom da soldatoj la tasko estos malgranda – kaj ni nepre kreos konfuzon kaj panikon inter la malamikoj.“

„Tion mi ordonos,“ la Reĝo promesis. „Kaj kion vi deziras por vi mem?“

„La du grandaj danĝeroj, kiuj minacas musojn en tiu ĉi lando estas inundoj kaj katoj. Kiam la rivero iom plialtiĝas, la akvo envenas niajn nestojn. Ĉu vi konsentos, konstruigi fortan baraĵon laŭlonge de la rivera bordo, por ke la akvo ne povu plu plenigi niajn nestojn? Kaj katoj ĉiam ĉasas musojn, do, ni humile petas, ke vi ekzilu ilin de via regno.“

„Se vi savos la regionon, vi havos vian baraĵon kaj malhavos katojn.“

La Reĝo de la Musoj faris la kutimajn ceremoniajn gestojn, kaj rapide revenis al sia musa popolo.

La suno subiris; kaj ĉiuj plenkreskaj musoj, centmiloj da musoj, estis pretaj servi al sia reĝo ĉe la rivera bordo. Tie ili trovis cent mil bastonetojn en bona ordo. La musoj tuj puŝis la bastonetojn sur la riveron, eksidis sur ili, duope aŭ triope, padelis per la piedetoj kaj facile vojaĝis al la alia flanko. Ili kviete kuris tra densa mallumo al la tendoj kie la malamika armeo dormis. La musoj mordis la kordojn de la pafarkoj kaj la portilojn de la pafiloj, dente detruis la ŝnurajn fuzeojn, difektis la vestaĵojn de la soldatoj kaj eĉ formordis harplektaĵojn de tiuj, kiuj dormis plej profunde. Ili faris ĉion, kion centmiloj da musoj povas fari per la dentoj; ĉifonigis tendojn, formanĝis grenon, farunon kaj aliajn nutraĵojn, mordis kordojn, truis ŝuojn, kaj ĉie ion manĝis, kion homoj zorge aranĝis. Post du-tri horoj da sabotado la musoj reiris al la rivera bordo, residiĝis sur siaj bastonetoj kaj revojaĝis padele al la amika bordo. Neniu rimarkis ilin.

La suno leviĝis. Ankaŭ leviĝis multaj krioj kaj malbelaj vortoj el la tendaro de la malamika armeo. La soldatoj vekiĝis kaj trovis paf-arkojn neuzablajn, pafilojn nek uzablajn nek portebajn, uniformojn truoplenajn, sen butonoj, sen insignoj. Baldaŭ ili ankaŭ konstatis, ke ili ne matenmanĝos, ke eĉ taso da teo kun butero ne estos havebla por varmigi kaj fortigi ilin.

Unue ĉiu soldato akuzis la najbarajn kamaradojn; poste la kverelado iĝis pli grandskala; oficiroj akre riproĉis soldatojn, soldatoj eĉ ekakuzis oficirojn. Aŭdiĝis laŭtaj krioj de „Ŝtelo!“, „Perfido!“ „Sabotado!“ „Spionoj!“ kaj multaj fiaj vortoj, ĉar soldatoj malsataj, malvarmaj, kaj sen uzablaj armiloj ne parolas tre elegante.

Ĝuste kiam en la frumatena lumo la tendaro estis en plena konfuzo, la malamika armeo ankaŭ aŭdis, de la alia bordo, klarionojn kaj kelkajn pafojn. Tute ne preta batali, la armeo forkuris malbonorde.

La Reĝo tre ĝojis, kaj ridegis pri la manovroj de la musoj. Li kore dankis la Reĝon de la

Musoj kaj lian popolon. Kaj li tuj plenumis siajn du promesojn. Li ordonis al arkitektoj kaj konstruistoj tuj plani kaj konstrui bonan, fortan baraĵon laŭlonge de la rivero, por ke ĝi neniam plu inundu la nestojn kaj dronigu la musojn. Kaj li dekretis ekzilon de ĉiuj katoj, kaj mortopunon por iu, kiu poste portos katon en la landon.

Li sendis heroldon al la malamika reĝo kun la jena averto: „Ni en nia lando ne deziras militon. Milito suferigos vian popolon kaj mian popolon, kiu ajn venkos. Ni rajtas defendi nin kontraŭ ĉiu, kiu nin atakas kaj ni forte defendos nin. Sed ni deziras, se eble eviti nenecesajn mortojn kaj vundojn. Do, unue ni sendis nian armeon de musoj, kiuj venkis viajn soldatojn sen elverŝo de sango. Ni proponas al vi pacon, sed se vi denove atakos, ni sendos kontraŭ vi armeon de niajn dombestojn kaj kortbirdojn, se ili ne sukcesos, ni sendos niajn sovaĝajn bestojn kaj finfine, se ni ne povos per moderaj diskutoj kaj prudentaj kompromisoj eviti plene militon, mi mem kondukos al batalo miajn lertajn kaj kuraĝajn soldatojn.“

La malamika reĝo estis sufiĉe saĝa, por aŭskulti atente kaj poste li komprenis, ke se la musa armeo povis tiom detrui, estus malsaĝe, riski pri la armeoj de dombestoj, sovaĝbestoj kaj soldatoj. Estos pli saĝe tuj interkonsenti pri pac-traktato. Do, la du reĝoj facile preparis traktaton kaj la du regnoj longe restis en amika rilato. Ankaŭ la musoj restis feliĉaj, ĉar la Reĝo protektis ilin kontraŭ inundoj kaj katoj kaj pro sia meritplena servo al la patrolando, ili ĉiujare ricevis unu grenejo-plenon da greno.

## **La du vazoj - ĉina fabelo**

Maljuna ĉina virino havis du grandajn vazojn, pendantaj je la ekstremo de bastono, kiun ŝi portis sur la ŝultroj. Unu el la vazoj havis fendon dume la alia estis perfekta kaj estis ĉiam plena da akvo fine de longa marŝado de rivereto al domo, dume la tiu krevita vazo restis duonmalplena.

Dum du jaroj la afero daŭris kaj virino portis hejnen nur unu plenan vazon kaj nur duonon da akvo en la dua vazo. Kompreneble la perfekta vazo estis fiera por siaj rezultoj. Sed la mizera fendita vazo hontis por sia difekto kaj ĝi estis humiligita por tio, ke ĝi povas fari nur duonlaboron por kiu ĝi estis produktita.

Post du jaroj dum kiuj ĝi konsciis pri sia amara fiasko, iun tagon ĝi parolis al virino dumvoje: „Mi hontas pri mi mem, ĉar ĉi tiu fendo sur mia flanko kaŭzas tion, ke la akvo survoje foriras, anstataŭ estu alportata al vi hejmen.“

La maljunulino ridetis: „Ĉu vi ne ekrimarkis ke viaflanke kreskas floroj sur la vojeto, sed ili ne kreskas sur la flanko de la alia vazo? Tial, ke mi scias pri via difekto, pro tio mi plantis semojn de floroj sur via flanko de la vojeto kaj vi ĉiutage dume ni revenis, akvumis ilin. Dum jam du jarojn mi povis rikolti tiujn belajn florojn por dekoracii la tablon. Se vi ne estu tia, mi ne havus florojn por delikatigi hejmon.“

Ĉiu de ni havas propran specifan difekton kaj ĝuste estas la fendo kaj la difekto, kiujn ni havas, ke kreas nian kunvivadon pli interesa kaj pli utila.

Tradukis Giuseppe Affaticati kaj Baloghné Fodor Éva.

## **Kiel mi renkontis ĉeĥan libron en bazaro en Kalifornio...**

Lucie Zinke

El kolekto de elektitaj konkursaj rakontoj, aranĝita de urba biblioteko en Mladá Boleslav

Kiam iu demandus min, kion mi imagas pri nocio „libro“, mi respondus „manĝo“. Certe vi demandos kial. Por granda parto de homoj signifas ambaŭ la gravajn objektojn por ilia vivo. Per frandado vi karesas la ĉelojn en lango, per legado la ĉelojn en cerbo per imago kaj travivaĵo.

Manĝon kaj literaturon oni povas elektadi abunde, laŭ propra gusto. Iu ŝatas supon, iu saŭcon, iu ŝatas desertojn. La sama afero estas kaze de libroj. Iu preferas fabelojn, alia kun ĝojo



kuŝas en longaj romanoj kaj alia pasas belajn horojn travivante hororajn okazaĵojn.

Sed mi per tio ne volas diri, ke iu „franca bageto“ estas la plej bona manĝo en mondo kaj same opinias pri legado de libroj en la franca. Miaj travivaĵoj estas pli kontraŭaj. Mi vivas pli ol unu jaron en Usono. La lokan nutraĵon mi kapablas akcepti maksimume unu semajnon, poste miaj ĉeloj por gusto akre protestas. La manĝo konsistas el „hamburgeroj“, „hot-dogoj“ kaj dolĉaj-salitaj strange gustaj biskvitoj. Kiam vi maĉas ilin, ili ŝanĝas al io nedifinebla maso, kiu forte sin gluas sur palaton. Nemirinde, ke mi ĉiam aprezas, kiam mia patrino kuiras por mi ion ĉeĥan, altvaloran, ekzemple anetan saŭcon. La afero de legado estas la sama. Nur nun mi konsciis, kiel gravaj estas por mi ĉeĥaj libroj kaj kiel multe mi sopiras pri ili. Tre multe mi elspezus, por ke mi povu foliumi en enua, sed ĉeĥe presita lernolibro pri historio! Mi palpus per okuloj ĉiujn konatajn literetojn. Mi karesus ĉiujn vortojn, kiuj rememorus al mi hejmon. Mi observus la nigraĵojn sur papero, kiuj prezentas mian lingvon, mian gepatran lingvon. Nur ĉi tie en Usono mi eksciis, kiel mi amas ĉeĥajn libretojn kaj kion ili por mi signifas.

Komence de mia restado en Ameriko mi esperis, ke mi trovos ian ĉeĥan libreton eble en iu bazaro, kiuj okazadas marde kaj ĵaŭde. Kial tie? Ĉar inter budoj ordinare staris malnova ŝarĝaŭtomobilo, flava, post kelkaj averioj difektita. Ene de ĝi la posedanto instalas bretarojn kun vera riĉeco – amaso de brokantaj libroj, kiujn ĉiu povis forporti senpage. Mi ŝatis rigardi kaj prenadi en manojn tiujn librojn kaj kredis ŝancon trovi ion, eble multe detruitan, sed en mia gepatra lingvo. Mi esperis vane. Mi nur iam trovis kelkajn libretojn de fabeloj kaj lernolibron en hispana lingvo. Ankaŭ mi trovis vojaĝpriskribon pri vivo en Eŭropo kaj tie mencion pri Ĉeĥoslovaka respubliko (mia koreto ekĝojis), sed temis pri usona vido al periodo de socialismo (kaj mia koreto denove trankviliĝis). Ĉiuj aliaj libroj estis en angla lingvo. Tamen mi neniam ĉesis esperi, ke mi trovos mian trezoron – ĉeĥan libron.

Iam merkrede mi petis gepatrojn, ke ili iru kun mi ĵaŭde en bazaron. Mi antaŭĝojis, kiel mi serĉos inter libroj denove. La gepatroj konsentis kaj mi enlitiĝis kontente.

Mi ekdormis, sed la dormo estis mallonga, mi jam ellitiĝis, estis ĵaŭdo posttagmeze. Interese, mi malmemoris vekiĝon, eĉ la instruadon en lernejo, eĉ mi necerte memoris taskojn. Certe mi nur sciis, ke ni iros en lokon bone konitan – al buseto kun libroj. Mia patrino jam estis vestita kaj invitis min iri. Ni ekiris el hejmo. Estis strange, ke ni kiel kutime ne interparolis kaj estis en la loko suspekta rapide. Ni iris laŭ lignaj budoj kun fruktoj, legomoj, statuetoj, mansaketoj kaj orelingoj kaj mi post momento ekvidis tion, kion mi atendis – buseton kun libretoj. Kiel fulmo mi alkuris kaj komencis legi titolojn de libroj: „The Human Body“, „The life in India“, „How do draw“...tiu libro ekŝatis al mi kaj ĉar mi ŝatas desegni, mi prenis ĝin kaj ekfoliumis. Ĝi ekplaĉis al mi, la bildoj en ĝi plenumis multe da spaco. Mi legis plu: „Psychology in the language“, „Pájara Pinta“...denove io el la hispana... „Červená Karkulka“, „The story of...“ – tion mi ne legis plu. Miaj okuloj rapide revenis. Tio ne povas esti vero! Mia koro forte ekbatis. Červená Karkulka – Ruĝa ĉapo!!! Mi legis la titolon almenaŭ dekfoje. La libreto estis malgranda, iom eluzita, sed por mi io la plej bela, kion mi iam vidis. Mi rapide ĝin malfermis kaj komencis legi de unua paĝo: „estis iam unu knabineto kaj tiu ĉiam vestis sin ruĝan ĉapeton, pro tio oni nomis ŝin Ruĝa ĉapeto...“ Mi estis feliĉa, ĉar mia sopiro plenumiĝis kaj mi trovis inter anglaj libroj ĉeĥe verkitan rakonton, kiun al mi rakontis gepatroj aŭ geavoj antaŭ dormo, kiam mi estis infano. Mi montris la libreton al patrino kaj ŝi kapjesis preni ĝin hejmen kaj komune legi la rakonton.

Kiam mi revenis hejmen kaj la pordo fermiĝis mi tuj ekmergiĝis en rakonton: „Iam estis knabineto, al kiu panjo aĉetis ruĝan ĉapeton kaj pro tio nomis ŝin ĉiuj Ruĝa Ĉapeto...“, mi haltis. Antaŭe la rakonto komencis alie. Eble mi mislegis, ion mi trassaltis. Mi daŭrigis legadon: „...iam la patrino diris al ŝi: Ruĝĉapulineto, via avino havas naskiĝtagon. You should go there and bring her some cake and vine...“, mi rigardis strangan tekston, kvazaŭ ĝi estus kristnaska arbo en somero. Ja, tio ne estas eble! Miaj okuloj preskaŭ elfalis kaj mi legis denove sekvan frazon, sed nun estis skribite: „...vi devus alporti al ŝi torton kaj vinon.“ Strange. Venis al mi nigra ideo: mi freneziĝas el angla lingvo. Mi preferis legi plu: „Ruĝĉapulino konsentis, ŝi metis en korbeton trodolĉan usonan torton kun blu-ruĝ-flava kremo kaj blankan vinon kaj ekveturis aŭte al la avino...“ mia cerbo protestis: ne, ne, ne, kia skribaĉo! Rapide mi trafolumis kelkajn foliojn. Mi daŭrigis legon tie, kiam

la knabino renkontis lupon...denove miaj okuloj larĝe malfermiĝis...mi legis: „Ŝi preskaŭ la lupon traveturis sur stratpasejo por pasantoj“. Mi ĉesis legi. Io ne estis en ordo. Tio, ke ĉiuj usonaj tortoj estas tro dolĉaj kaj buntkolorigitaj, ke oni ĉiam uzas aŭton kaj la pasantoj havas ĉiam prioritaton, eĉ ekster pasejo, estas ja vero, sed en fabelo tio ne konvenas. Temas pri ĉeĥa fabelo! Ĉu usonanoj ĝin adaptis? Sed la teksto estas skribita en ĉeĥa lingvo. Tiun misteraĵon mi ne kapablis solvi. Mi daŭrigis legon, ĉar mi estis scivola, ĉu venos ĉasisto. Tion mi jam ne eksciis, ĉiuj literoj komencis salti kaj vortoj malaperadis en nebulon.

Subite mi aŭdis teruran sonon. Mi rapide sidiĝis kaj haltis ĝenan vekilon. Nur poste mi ekkonsciis, ke mi sonĝis. Sekve mi komprenis kial en la rakonto trifoje aperis diversa komenco, kial mi ne memoris kio okazis en lernejo, kial la tria frazo estis skribita angle kaj kial aperis la stranga, kolora torto. Mi ekkomprenis, ke Ruĝĉapulineto povis faligi lupon per aŭto. Mi ekridis kaj estis kontenta, ke mi nur sonĝis.

Eble vi scivolas, ĉu mi trovis tiun ĉi tagon en flava kamioneto ian libreton ĉeĥe verkitan. Ne, mi ne trovis, tamen mi serĉis pli longe ol kutime. Ne gravas, mi plu vizitas bazaron preskaŭ en ĉiu mardo kaj ĵaŭdo, sed nenion mi trovas. Mi sopiras reveni hejmen en Ĉeĥan respublikon kaj legi almenaŭ unu ĉeĥan libron...eĉ nur la enuan historian lernolibron.

Traduko JoDo.

## Rakonto pri ...

Myra Brooks Welch

Kvankam la violono estis malnova, eluzita kaj skrapita kaj presidanto de aŭkcio opinis la provon pri la vendo kiel perdo de tempo, tamen li kun rideto levas ĝin kaj vokas: „Kiom vi ofertis, bonaj homoj, kiu komencos proponon?“

„Unu dolaron!“ Post momento: „Du dolarojn!“ „Nur du dolarojn? Kiu ofertis tri? Do tri – unuan fojon, tri duan...“

Subite de malantaŭo ekvenas maljuna viro grizhara kun arĉo, viŝas de malnova muzikilo polvon kaj pritenas kordojn. Li ludas melodion pure kaj dolĉe, kiel anĝelo. La muziko finsonis kaj aŭkcionisto per flustra voĉo demandas: „Kion vi ofertas nun je tiu malnova violono?“ kaj levas ĝin kun estimo kune kun arĉo: „Mil dolarojn? Kiu ofertas du mil? Du mil! Kaj kiu tri mil? Jes mi dankas – tri mil unuan fojon, tri mil duan! Kiu proponas tri? Jes, mi dankas, tri mil unuan fojon, tri mil duan fojon...vendite!“

Homamaso aplaŭdas kaj iaj ploras, neprecize oni komprenas ŝanĝon, kial tiel rapide ŝanĝiĝis la prezo?

Iu saĝa klarigas: „Tion kaŭzis tuŝo de majstra mano.“

Ekzistas ankaŭ homoj, kiuj vivas vivon, kiu sonaĉas, estas difektita kaj gratita per pekoj. Oni tian vivon vendus al senpensiga homamaso subpreze, oni ne kapablas animon. Sed oni povas ŝanĝi opinion post tuŝo de majstra mano, simile kiel okazis kun malnova violono.

El libreto de Bo Lozoff: We're all doins time.

---

## Reĝa rakonto

Bruno Ferrero

El la libro „Plua okazaĵo por ĝojo de animo“ eldonejo Portál 1997

Iam vivis ie iu reĝo. Iam li invitis el tuta lando ĉiujn sorĉistojn kaj diris: „Mi deziras esti por miaj subuloj ekzemplo. Mi volas esti firma dum ĉiuj aferoj kaj trankvila. Iam mi estas malgaja, eĉ iam sentas timeton, ĉar okazis ia malfeliĉa aŭ malagraba okazaĵo. Iam venas ia neatendita ĝuo aŭ granda sukceso. Tio ne plaĉas al mi. Mi sentas min kiel kano en vento, la sorto movigas min. Kreu por mi amuleton, kiu gardos min kontraŭ ŝanceloj de miaj anima stato kaj humoroj.“

La sorĉistoj unu post la alia rifuzadis tiun ĉi taskon plenumi. Ili scipovis krei amuletojn por ventanimulojn, sed mistifiki reĝon...kiu deziris tiel strangan amuleton. La reĝo preskaŭ komencis koleri, kiam el la vico elpaŝis unu tre maljuna saĝulo kaj diris: „Via Moŝto, morgaŭ mi alportos al vi ringon. Se vi rigardos ĝin, ĉiam kiam vi estos malgaja, vi gajiĝos, se vi ekkoleros, vi trankviliĝos. Sufiĉos legi misteran surskribon gravuritan sur la ringo.“

La sekvan tagon la saĝulo revenis kaj en profunda silento de ĉiuj ĉeestantoj metis antaŭ reĝo la ringon. La reĝo rigardis ĝin kaj legis vortojn sur arĝenta ringo: „Eĉ tio forpasos.“

## Vatikana pano

Recepto por baki bakaĵojn en ĉeĥa medio

Tiun ĉi panon vi bakos unu foje en sia vivo. Por ke vi povu baki ĝin, vi devas ricevi pecon de pasto de amiko aŭ amikino. La paston vi metu en sufiĉe grandan pelvon kaj lokigu en kuirejo sur konvena loko, neniam en glaciŝrankon! La pasto grandiĝos. Komencu agi:

lunde – aldonu poton (2,5 dcl) da sukero kaj miksu

marde – aldonu poton (2,5 dcl) da lakto kaj miksu

merkrede – aldonu poton (2 dcl) da faruno mezmuĉita

ĵaŭde – nur miksu tri foje tage

vendrede – aldonu poton da lakto, poton da faruno, poton da sukero kaj miksu

sabate – la paston bone miksu kaj disdividu je kvar partoj. Tri partojn donacu al homoj, kiujn vi amas.

Dimanĉe – aldonu poton da faruno, kulerecon da pulvoro por baki, 1,5-2 dcl da oleo, sekvinberojn, migdalojn, ĉokoladon, vanilon, manplenon da nuksoj, tri ovojn, spicojn laŭ gusto, bone miksu kaj baku per ordinara maniero ĉe 170 °C.

La bakita pano alportos feliĉon por tuta familio kaj al la persono, kiu bakis ĝin, plenumos unu deziron. La persono, kiu la panon bakis, devas manĝi kiel la unua.

Tri virinoj – esperantinoj (ili ŝatas nenian ismon) atestas, ke la pano estis bongusta kaj tradukis la recepton por vi

Milada, Eva kaj Jindra  
el Boleslava E-klubo..

## Ĉeĥa pasko

Ĉeĥa pasko iel ne kongruas kun katolika religia etoso, sed estas ŝtata festotago. Frue matene lunde duan paskan festotagon venas junularo viziti knabinojn eĉ ĉiujn inojn kun batilo plektita speciale el salikaj vergoj, ornamita per koloraj rubandetoj. Unue venas infanoj kun petanta kanteto kaj ricevas kolorigitajn ovojn, ĉokoladojn kaj sukeraĵojn. Poste knaboj vipas knabinojn, ke ili estu sanaj kaj freŝaj. Ke la knaboj ne batu, la knabinoj donas al ili kolorigitajn ovojn kaj brandon por fraŭloj kaj ankaŭ ligas al vergbatilo rubandeton.

La kutimo estas ĝis nun viva kaj en iaj lokoj oni ankaŭ ankoraŭ ŝprucas akvon unu al la alia.

<p><i>Hody, hody, ĝojajn festojn!</i>  Mi estas leporeto.  Mi kuradis trans la pontoj  portis etan korbeton  por ŝi donu oveton.</p>	<p>Mi petas pri rubandeto  por dekori vipilon,  ĉar honesta leporeto  volas havi ilin milon!</p>	<p><i>Dum vergbato:</i>    Mi preparis junigilon  tut' el fleksaj vergetoj,  por vergbati ĉiun inon,  Bat, bat, bat – sana estu kor'!  Malsanecoj, sanproblemoj – iru  for!</p>
--	--	---

Laŭ ideoj kaj motivoj de la naciaj pasko-poemetoj, priskribis ĉefajn kutimojn kaj komponis kanteton paskleporeto Pavel Brom

### **.Feministinoj verkas en interreto anonime**

La patro revenante hejmen vidas, kiel liaj infanoj sidas en piĝamoj antaŭ domo kaj ludas en koto kun paperaĵoj kaj plastaĵoj de manĝaĵoj, kiuj estas dismetitaj tra tuta ĝardeno. Pordeto al strato estas malfermita, same kiel pordego de garaĝo. Ene de la aŭtomobilo kuŝas hundo, ŝmirita de koto. La dua hundo ne estas videbla.

La viro venas en domon kaj ekvidas eĉ pli grandan malordaĉon. Planka lumigilo falis kaj la tapiŝo estas volvita ĉe muro. Televidilo laŭte elsendas kaj manĝoĉambro estas plena de ludiloj kaj partoj de vestaĵoj.

En kuirejo ne estas pli bona ordaĉo. En lavujo estas monto de malpura vazaro. Radioaparato laŭtege muzikas. Restaĵoj post matenmanĝo staras sur manĝotablo disjetitaj kaj inter ili dormas kato. Glaciŝranko estas malfermita, manĝo por hundo estas disŝutita sur la planko, disrompita glaso kuŝas sub tablo kaj ĉe malantaŭa pordo estas amaseto da sablo.

La viro rapide grimpas ŝtuparon kaj paŝas tra ludiloj kaj vestaĵoj kaj neglektas ilin. Li serĉas edzinon. Li timas, ke ŝi malsanas, eble okazis io grava. Li ekvidas tra pordo, ke el banĉambro fluas akvo kaj sur planko estas malpura malseka vestaĵaro kaj la likva sapo estas disverŝita sur ludiloj inter vestaĵoj. Kilometroj da tualeta papero kuŝas disvolvitaj sure. La muroj kaj la spegulo estas desegnitaj per dentopasto.

La viro rapide turniĝas kaj rapidas al dormoĉambro. La edzino en lito ridetas al li, tenante libron en manoj, kaj demandas lin, kiel li fartis dum la tuta tago. La viro singardeme kaj malfideme rigardas ŝin kaj poste demandas: „Kio okazis ĉi tie hodiaŭ?“

Edzino denove ridetas kaj diras: „Ĉu vi memoras, karulo, kiel ĉiutage, kiam vi revenas el laboro, demandas min: Kion vi, stulta bovino, faris tutan tagon?“

La viro respondis heziteme: „Jes...“

„Do mi hodiaŭ... faris nenion!“

*Se vi tion ne sendos al viaj kvin bonaj amikinoj, la mondo perdos kvin ridetajn homojn.*

## Pri mamzono

En fino de la 19-a jarcento aperis kelkaj patentoj pri ina subvestaĵo, kiu intencis anstataŭi malkomfortan kaj malsanigan korseton. Sed kiel eltrovistino oni oficiale deklaris virinon Marie Phelps Jakob. Laŭ tradicia historieto ŝi preparis sin al balo kaj korseto ne taŭgis sub bela fajna robo. Ĝi aĉe eliĝis el dekolto. Do Marie rapide ekkudris el du fajnaj silkaj naztukoj kaj rubandetoj ion, kio aspektis kiel mamzono. Ĉar la specimeno ĝenerale plaĉis, ŝi en la jaro 1914 aranĝis al si pri tio patenton. Por malsperta negocistino estis realigo de fabrikado tro malfacila, tial ŝi vendis sian patenton al Warnes Brother Corset Company je 1.500 dolaroj. La firmao dum 30 jaroj akiris profiton de 15 milionoj dolaroj.

## Ateisto sub ruĝanta luno

Sen Rodin

Atendante admirari la anoncatan luneklipson, kaj dezirante ĝui ĝin en trankvilo, iu ateisto atingis aŭte Borekon, alfluantan de Trebbja, kaj piede eniris ties solecan valeton. Li paŝis sur pado serpentuma inter robinioj, kaŝtanujoj kaj kverketoj. La flavega plenluno suverene tronis en la ĉielo kavazaŭ anoncante la baldaŭan spektaklon, kaj sciuro akrobatis inter la branĉoj de akacio, tute malzorgante ĝiajn dornojn. Estis la dekunua kaj duono. „Strange“, pensis la ateisto, „ĉi-hore la sciuroj kutime dormas.“

Li sidiĝis apud avelarbo kaj turnis ĉielen la vizaĝon. Li pensis: „Ha, mirinda naturo! Ha, perfekta ekvilibro! Ha, kiel ekzakte funkcias la naturevoluo!“ kaj li ekstaziĝis atendante la eventon.

Kvaronhoron antaŭ noktomezo la lundisko iom malheliĝis ĉe la mlasupra bordo. Poste ĝi poiome ombriĝis, kaj ĉirkaŭ ĝi aperis iriza haloo el kiu sparkis oraj fajreroj. Dudek minutoj post noktomezo la haloo malaperis kaj la luno ree eklumis...sed eksterordinare ruĝe: ruĝe kiel matura ĉerizo.

„Bona ĉielo!“ pensis ŝokite la ateisto, „kio estas tio?“ sed li ne povis plupensi pri la lunkoloro, ĉar tiumomente masiva ombro aperis elinter la arbustoj, atingis lin kaj apogis siajn krifojn sur liajn ŝultrojn, sternigante lin teren. Estis bruna ursino kiu, neniel zorgante pri ĉielaj fenomenoj, simple serĉis manĝaĵon por si kaj siaj malsataj idoj, kiuj atendis en la nesto.

La ursino proksimiĝis sian faŭkon al la ateista kolo kaj...

...kaj en tiu drama tempero la ateisto fermis la okulojn kaj pensis intense: „SAVU MIN DIO!“

ŜŜŜ – la tempo haltis, ĉiuj mondobruetoj eksilentis, la sciuro senmoviĝis kvazaŭ statueto, kaj el la plej alta ĉielsupro tondris baritona voĉo, simila al tiu de Ivo Lapena: „VI, kiu neas mian ekziston! VI, kiu propagandas tian abomenan ideon! VI, nun petas mian helpon?! Kiel kompreni vian alvokon? Ĉu vi pretas konvertiti al mia sankta religio?“

La ateisto intense pensis: „Nu, estimata Sinjoro, se mi konvertiĝus ĉimomente, ĉiuj dirus – ja, li tion faris nur por savi sian vivon! – Ĉu vi ne povus prefere konverti la ursinon?“

„ESTU FARITE!“ tondris la voĉo.

Dirite-farite: reaŭdiĝis la mondosusuro, la luno pluruĝigis la mondon, la sciuro plu akrobatis. La ursino kunigis siajn antaŭajn piedojn, klinis la kapegon kaj preĝmurmuris: „Dankon, Bona Dio, por ĉi bona nutraĵo kiun vi donacis al mi.“ Ŝi proksimigis sian faŭkon al la ateista kolo kaj...

...kaj la naturamanta ateisto revenis al sia amata naturo.

Transpenite el BAZARO - E-revuo, Kluĵo, Rumanio  
Jaro XI, Numero 1 (40) 2007, Printempo.

## La vetero interesas ĉiujn

Permesu, ke mi konatigu vin kun mia nova aparato en mia ĝardeno. Temas pri aŭtomata mezurilo, tutjare funkcia pere transprenado de datenoj por globala loktrova sistemo.

Mezurilo konsistas el 3 partoj:

1. memstara poto por pluva kaj neĝa akvo
2. komunika kaj tensia unuo
3. komputilo en hidrologia filio en Praha Komořany

En duobla pakumo de la poto por pluvo kaj neĝo estas varmiga spiralo, kiu varmigas neĝon se necese. Sub la poto estas spaco, kie estas renversigebla navedo. La navedo renversiĝas ĉe unu dekonon da milimetro da akvo. Ĝi sendas impulson en komunikan unuon. La unuo sendas impulson per globala loktrova sistemo de datoj pri kvanto de la akvo al la komputilo en hidrologia filio en reala tempo.

Sub la navedo estas du aperturoj por defluo de akvo. Spiralo ŝaltiĝas nur kiam la temperaturo malleviĝas sub +2°C. Elektraj kabloj kondukas de la poto tra stativo en teron kaj subtere al komunika unuo. Dum nefunkciado de elektra energio, mezurilo funkcias ankoraŭ unu horon. En komunika kaj tensia unuoj estas ankaŭ akumulatoroj.

Ĉi tiuj aŭtomataj mezuriloj estas instalitaj en Ĉeĥa respubliko sur 50 lokoj.

Aleš Vávra, Ĉeĥio.

## Kion vi scias pri glaciaĵo?

En greklatina epoko povis frandi nur la plej riĉaj homoj glacieron kaj neĝon somere, kiujn oni portis de la pinto el „monto de dioj“ – Olimpo. Ke malvarma frandaĵo ne degelu, rapidaj kuristoj transportis ilin per stafeto. La neĝon oni miksis kun fruktaj suktoj, vino kaj mielo. Tiun frandaĵon ŝatis verkisto Simonides el Keo aŭ Aleksandro la Granda. Ankaŭ romiana imperiestro Nero preferis malvarmigatajn trinkaĵojn.

Sed vera glaciaĵo naskis hazarde en – Mongolio! Mongoloj dum jarcentoj preparis diversajn trinkaĵojn el kaprina, ĉevalina kaj gruntbodyina lakto. En malvarma montara klimato la trinkaĵoj facile frostiĝis. Kaj tio estis la unua lakta glaciaĵo.

Kiamaniere venis la glaciaĵo al Eŭropo?

Fama vojaĝanto Marko Polo alportis en la fino de la 13-a jarcento krom aliaj novaĵoj ankaŭ kelkajn receptojn pri glaciaĵo al sia hejmo kaj de Italio la glaciaĵo konkeris Eŭropon kaj Amerikon.

Plua paŝo estis eltrovo de iu sukeraĵisto, kiu sukcesis fabriki artefaritan glacieron en la jaro 1530. De tiu tempo oni povas legi en malnovaj kronikoj pri glaciaĵaj festenoj dum reĝaj edzofestoj en Eŭropo.

Post 150 jaroj oni en Parizo malfermis unuan glaciaĵan kafejon, kien la glaciaĵo allogis tiajn gastojn, kiuj estis ekzemple Denis Diderot, Jean Jacques Rousseau kaj Voltaire.

La unuan glaciajmaŝinon konstruis usonanino Nancy Johnson en la jaro 1790. La maŝino enhavis vazon kun miksaĵo de ingrediencoj kaj tiu vazo helpe de mano pere de anso turnadis en pli granda vazo en kiu estis glacio kun salo. Tian glaciaĵon povis gustumi prezidento George Washington. La kvara usona prezidento, kiel la unua en la jaro 1816 prezentis tian glaciaĵon dum ŝtata bankedo.

En Usono la glaciaĵo enhejmiĝis. Kaj denove usonano Job Fussel en Baltimore kiel la unua lanĉis industriajn fabrikadon de la glaciaĵo.

En Eŭropo multe helpis al progreso de glaciaĵo Carl von Linde, eltrovinto de glaciŝranko.

Laŭ [www.nadoma.cz](http://www.nadoma.cz)

J.Drahotová

## Kion vi scias havante balotrajton?

La ĝenerala balotrajto en nia lando estis lanĉita en la jaro 1907, sed nur por viroj! Egaleco de seksoj komencis nur de la jaro 1918. La unua lando kun samaj balotrajtoj por virinoj kaj viroj estis vakera ŝtato Wyoming en Usono ekde la jaro 1890. Kontraŭ tio la Svislando permesis al virinoj baloti en federalaj balotoj nur en la jaro 1971 !

Estonio estas la unua lando, kie oni povas de la jaro 2007 voĉdoni en parlamentajn balotojn pere de interreto. Tiun ĉi eblecon uzis 30.000 civitanoj. En aliaj ŝtatoj tielmaniere povas voĉdoni nur en lokaj balotoj. Onidire en estonteco ni povos voĉdoni pere de SMS poŝtelefono.

La aĝo de voĉdonantoj iom post iom malaltiĝas. Tio okazis post la dua mondmilito. La aĝo por balotrajto sinkis de 21 jaroj al 18 jaroj. Eble jam venas plua ondo – en Aŭstrio ekzemple la limo por voĉdonado al parlamentaj balotoj estas 16 jaroj. En Norda Koreio, en Nikaragvo, en Orienta Timoro, en Kubo voĉdonas deksepaj aŭ dek sesaj voĉdonantoj. Male en Vatikano – la papon oni povas elekti nur kardinaloj pli junaj ol 80 jaroj. Simile en Brazilo civitanoj pliaĝaj ol 70 jaroj ne estas devigaj voĉdoni, sed kompreneble ili povas.

Ĉirkaŭ en 30 ŝtatoj ekzistas devo voĉdoni. Klasika ekzemplo estas Belgio, kie oni monpunas nevoĉdonantojn. En Eŭropo havas devon voĉdoni civitanoj en Grekio, Luksemburgio kaj Cipro. Sen puno ekzistas devo voĉdoni ankaŭ en Italio.

El „Informilo“

Monata gazeto de Asocio de E-Handikapuloj, Ĉeĥio.

## Horologium Pragense



Pavel Brom, Mladá Boleslav, Ĉeĥio

Kiam oni vizitas la ĉeĥan ĉefurbon Pragon, multe da homoj kunvenas je ĉiu plena horo sur la Malnovurba placo por spekti interesan meĥanikan teatraĵon. Sonriletoj ekludas, du fenestretoj malfermiĝas kaj sume dek du apostoloj aperiĝas kaj salutas. Poste la teatraĵo finiĝas kaj homoj foriras kun malforgesebla travivaĵo. Nur kelkaj fakuloj bone scias, ke la Praga astronoma horloĝo montras multe pli da aliaj informoj!

Ni komencu la paroladon pri historio, kiu dum tempo kelkfoje ŝanĝis, transskribiĝis. Laŭ legendo, aŭtoro de la horloĝo (ĉeĥe oni nomiĝas ĝin „orloj“ de la latina *horologium*) estis majstro

Hanuŝ. Li sukcesis konstrui admirindan horloĝon, kiun aliaj urboj povus envii. Do kiam venis la tempo Hanuŝon salajrigi, urbestro decidis lin blindigi ke neniu urbo certe ne havos similan miraklon.

Ne pli frue ol en la 20a jarcento oni trovis kredindan veron pri la aŭtoreco. La ĉefproblemo estis incendio de la urbdomo dum la dua mondmilito, dum kiu oni perdis gravajn dokumentojn. Multe helpis malkovro de unu kopio de la Raporto pri la Praga horloĝo. Ĝi parolas pri majstro Mikuláš de Kadaň, kiu bezonis por laboro ankoraŭ alian eminentan scienculon. Nuna opinio estas, ke la Pragan horloĝon konstruis Majstro Mikuláš de Kadaň ĉirkaŭ la jaro 1410 laŭ kalkuladoj de Magistro Jan Šindel, astronomo kaj matematikisto el la Praga universitato. Eĉ aliaj konataj faktoj subtenas tiun respondon.

Ni ne forgesu akcenti, kion ĉion oni povas legi sur la horloĝo! Ĉefe ĝi montras kvar diversajn tempojn: la italan (numeroj I – XII), la planedajn horojn (nigraj ciferoj la plej interne), la steltempon (per stelo kontraŭ numeroj I – XII) kaj finfine la malnovĉeĥan tempon (1 – 24 la plej ekstere), ekkalkulante de la lasta sunsubiro. Do la 24a horo montras kontraŭ la itala numeraro la tempo de sunsubiro. Nur atentu, ke la horloĝo ne adoptas la somertempon!



La astronoma horloĝo similas al marista astrolabo (sed ĉio estas male), do ĝi montras kontraŭ kvar areoj poziciojn de steloj, zodiakaj stelaroj, la Suno kaj Luno sur la ĉielo. Se la objekto troviĝas en la blua areo la plej supre, ĝi estas videbla super la horizonto, alie oni ne povas observi ĝin. Kiam la Suno troviĝas en la brunaj areoj (Crepusculum kaj Aŭroro), ĵus estas krepusko aŭ tagiĝo. Admirinda kaj inĝenia estas la meĥanismo de la lunglobo, do ĝi montras la aktualan videblan lunformon.

Ornamentojn kaj aliajn simbolojn oni klarigas per astrologio kaj religio kaj ni vere povus esplori plu. Ni finu la paroladon per ekkono, ke la Praga horloĝo estas unika meĥanikaĵo, la plej malnova funkcia aparato kun originaj detalaĵoj pravas sciojn kaj lertecon de niaj antaŭuloj.

(La astrolabo en la bildeto montras proksimume la tempon 18 h, estas meznokto de la steltempo (vidu la steleton). La 24a horo diras, ke la sunsubiro okazos ĉirkaŭ 20:15 h. La Luno troviĝas en la stelaro de fiŝoj (Pisces) kaj nun ĝi ne estas videbla, ĉar ĝi estas sub la horizonto.)

## En fremda urbo (eroj el la libro)

Arvo Valton

Aŭtune falas folioj, sur ĉiu folio estas poemo, sed malmultaj scipovas ilin legi.

- o -

La fenestroj estis malfermitaj unu kontraŭ la alia kaj vento trablovis. La fenestro, tra kiu vento eniris, flustris: „Salutu mian parencon!“

Kiam la vento atingis la fenestron, el kiu foriris, ĝi aŭdis ties flustron: „Ĉu mia samnomulo sendis sian ŝuldon?“

Alian fojon, kiam la vento blovis tra la ĉambro en kontraŭa direkto, ili diris same: la enlasanta fenestro sendis salutojn kaj la alia postulis ŝuldon. Sed la vento silentis aŭ mallaŭte kantis por si mem. Estis pli saĝe ne miksiĝi en fremdajn aferojn.



Sur bordo, sur kruda sablo en kelka distanco de la akvolimo kuŝis soleca ŝtono. Iam ĝi estis anguleca roko, sed nun glatpolurita de ondoj de la alta tajdo. Ĝi sentis sin nuda kaj opiniis, ke ĉiuj rigardas ĝin.

De tempo al tempo sidis sur ĝi mevoj, ili ne sciis, ke la ŝtono hontas. Alie ili estus dirintaj al ĝi, ke neniuj rigardas ĝin.

Alia afero, ĉu tiu scio estus konsolo por la ŝtono?

- o -

Bankbileto eliris el monfarejo nova kaj pura. Ĝi komencis cirkuli en la lando. En iu loko staris kun levita mano mikrobo. La bankbileto haltis.

„Surprenu min,“ petis la mikrobo.

„Mi ne estas veturilo,“ diris la bankbileto. „Mi iradas de mano al mano kaj nur pagadas.“

„Prenu tamen,“ petegis la mikrobo. „Mi estas malpeza, sed tamen iom valoras.“

„Ĉu ni havas komunan vojon?“ dubis la bankbileto.

„Ĉiam havis,“ asertis la mikrobo, kaj ili ekiris komunan vojon..

Poste sur la bankbileto elkreskis tuta kolonio de mikroboj, sed ĝi valoris same multe kiel antaŭe. Vere, varojn oni ricevis por ĝi ĉiam pli kaj pli malmulte.

„Varoj ne gravas,“ pensis la bankbileto. „Mi havas pasaĝerojn. Se per mi oni eĉ nenion plu ricevos, tiam pasaĝeroj tamen restos al mi.“

- o -

Tio estis stranga urbo, en kiun li ĉi-foje hazarde estis veninta. Tute malplena kaj senkaraktara. Apud la stratoj staris domoj kaj maloftaj homoj moviĝis silente laŭ la trotuaroj.

Li klopodis alrigardi ilin, sed iliaj rigardoj glitis flanken, super, trans, tra li, povas esti, ke ili eĉ ne havis okulojn.

La domoj estis grizaj, verdaj, brunaj, flavaj, tamen tute grizaj, la altaj feraj bariloj antaŭ ili ne moviĝis. Li kaptis kvazaŭ hazarde la manon de renkontata junulino, sed la mano glitis tra la maniko, tio estis senanima malpleno. La aero estis malvarma, nebula pro elektra lumoj, nur la malproksima reklamo volis ruĝe impresi, sed tion siavice ne vidis li.

Li turnis sin al interstrato. Malantaŭ de mallumaj arkpasejoj estis senordaj kortoj, ies mano verŝajne estis ĵetinta tien tiujn tabulojn, ies ombro ĉiutage glitinta super ili. Eĉ la lumetoj en la fenestroj estis senvivaj, tiuj homoj estis por li neniuj, fremdaj pensoj, nek ĝojo, nek malĝojo.

Malproksime, tre malproksime estis de li tiu ĉi urbo, de tiu varma, signifa lago, kie li naĝis, de tiu briletanta akvario, kie verdaj tigoj tremetis al li, de tiu estado. Fore li estis de tiu ĉi urbo kaj sola kaj ne troviĝis alia mondo en la videbla spaco. Nur la vespera krepusko, senmova nebulo, domoj, stratoj nenia alia ebleco. Ĉi tie devus esti iu, por ke li sentu sin ligita al io.

Sed la homoj ŝvebis malvarmete tra li, eĉ unu ulo ne tuŝis la animon. Kiu urbo tio povis esti, ke li ŝajnis sin tiel superflua? Kiel li estis trafinta ĉi tien? Aŭ li ĉiam vivis ĉi tie sian buntan ĉiutagan vivon kaj nur hodiaŭ ĉio ŝajnis esti alia?

Li decidis alparoli la unuan renkontaton. Li diris: „Saluton, mi ĝojas konatiĝi kun vi.“

Li ne aŭdis sian voĉon, tamen restis espero, ke la renkontato havas pli bonan aŭdon. Sed tiu sono ne atingis tiun, kiu senhaste preteriris, ne turnante la kapon.

Li postrigardis la viron, ĉu ekzistas forto, kiu flankenigus lin de la vojo? Malatenti ĉion, sed kien tiam iri, kun kio sin ligi, kompari, kiel difini tion ununuran, kio rigardas el li per scivolema rigardo?

Neniu alpaŝis lin, ordonis ion, petis helpon, apogis sin al li. Kial li entute iradis kaj kien li estis irona?

Kaj tiam li subite ekvidis en malhela volbita trairejo surtere kurbiĝintan homan figuron. Li iris sub la volbaĵon, kliniĝis al la figuro, tiu ne moviĝis. Se la homo ne moviĝas, tiam al staranto estas eble kontaktiĝi kun li. Li kliniĝis pli profunde kaj sentis, kiel la koro komencas pli rapide bati.

La kapo de la kuŝanto estis kaŝita inter la manoj, ne estis kompreneble, kial li tie dormas.

Li singarde levis supran manon flanken. Tamen tiu homo ne estis beate ebria, el lia buŝo ne venisodoro de brando. Sed en la buŝangulo estis eta apenaŭ rimarkebla strio de sango. Tio estis kadavro, subite ĝi sentiĝis tiel proksima.

Li staris longan tempon kliniĝinte super la kadavro, ĝis la dorso rigidiĝis. En la homo estas io bela, ĉiam estis io tre stranga en ĉiuj tiuj homoj, se ili nur tiel senskrupule ne trapenetrus lin.

Li rektiĝis malrapide, kompateme rigardis la kuŝanton kaj reiris senhaste al la ĉefa strato. Tie sur angulo li estis vidinta telefonon.

Li elektis la telefonnumeron de la polico kaj diris: „Mi opinias, ke vi devus veni ĉi tien, sub la volba trapasejo estas kadavro.“

En la telefono io knaris, la junulinan voĉon sekvis vira, kiu diris metale: „Ripetu, ripetu, mi petas.“

Li ripetis.

„Kie tio estas?“

Li ne sciis, li ĉirkaŭrigardis.

„Proksine de la ĉefa strato, tie estas vendejo de fotomaterialoj, mi atendos vin sur la angulo.“

„Kio estas la nomo de la strato, ĉu vi do ne scias?“

„Atendu momenton, ne formetu la aŭskultilon,“ li diris, demetis la telefon-aŭskultilon, iris al la angulo kaj penis en la mallumo rigardi la nomon de la interstrato. La ŝildo estis senespere eluziĝinta, li pli divenis la nomon ol legis ĝin.

„La Bombogisa,“ li diris en la telefon-aŭskultilon.

„Atendu nin en la loko, kie tio okazis,“ diris la voĉo iom minace kaj la aŭskultilo estis ĵetata sur la forkon.

Li iris al la strato kaj ĉirkaŭrigardis, tiu estis subite fariĝinta pli viva, eĉ bunta. La homoj ial rapidis ien, iu ie ridis. Ne, vere ridis, li ne aŭdis erare.

Jam antaŭ ol li atingis la interstraton, venis zumante du aŭtomobiloj, tiu de polico kaj de kuracisto.

Li ekkuris kaj montris al la aŭtomobilo vojon. Li kuris, rapidis, li sciis, kien iri, li gvidis armeon, homojn, agojn, subite multaj bezonis lin.

La aŭtomobiloj obeis lin kaj li gvidis ilin al la volba trapasejo. Antaŭ la alveno lian kapon trafugis timo, ke eble la kadavro ne estas plu sur la loko, ĝi foriris, estas forportita, ĉio estis nur halucino. Sed kun la kadavro ĉio estis en ordo, ĝi estis en sama pozo.

La polica kuracisto tuj konstatis, ke la kurbiĝinta figuro estas senviva kaj ne bezonas kuracadon, antaŭviditan al vivantoj.

Oni portis la kadavron en la polican aŭtomobilon kaj li iradis inter la policistoj kvazaŭ apartenante al ili, sed ili ne rimarkis lin antaŭ ol la loko estis fotografita kaj esplorita kaj venis la tempo por forveturi. Oni ordonis, ke ankaŭ li enaŭtiĝu kaj li kaŭriĝis apud la kadavro. En tiu pozicio ankaŭ unu fotoaparato fulme rimarkis lin.

En la policejo oni tenis lin unu aŭ du horojn en iu antaŭĉambro, sed lin ne tedis la observado, kiam viroj kun grava kaj laca vizaĝo preteriradis lin. Por momentoj io ekbrilis en li tute ne ekmemoris la grizan urbon, tamen la volban trapasejon, kie li trovis la kadavron, li ekmemoris.

Tiam venis al li unu policisto kaj demandis: „kiu li estis por vi?“

„Mia plej bona amiko,“ li diris rapide. Eble tio ne estis tute vera, sed tamen li ne bedaŭris, ke li tion diris. Dum tiu tempo li efektive ekhavis la senton, ke en tiu stranga urbo li ne havas pli proksiman homon, eĉ la policistoj kaj karcergardistoj estis tro nekomplezemaj kaj okupitaj per siaj pensoj.

Tiam li estis vokata en alispecan ĉambron, oni turnis brilan surtablan lampon al li, li estis sur scenejo, en sceneja lumo, en brilo de famo, en varmo de atento. Li estis ĉi tie pli grava ol la policisto, kiu sidis malantaŭ senkolora tablo kaj prepariĝis por skribi.

„Kiu estis la mortigito?“

„Mia amiko.“

„Ĉu vi konis lin?“

„Ne konis.“

„Kio estas lia nomo?“

„Eble Paŭlus, mi ne estas tute certa..“

„Kio estas via nomo?“

„Mi neniam pensis pri tio.“

Jes, tiel efektive estis. Ho, kiel longe li ne estis pensista pri tio!

„Sed mi devus havi ĉi tie unu kvitancon,“ li diris esperplene kaj komencis serĉi en siaj poŝoj. Fine vere aperis ĉifita paperpeco. Li glatigis ĝin, levis en helan lumstrion kaj ekkriis ĝoje: „Tiel mi opiniis! Ĉi tie estas skribite: Miller. Mia nomo estas Paŭlus Miller, tre eble.“

La policisto longe rigardis lin.

„Kiam vi naskiĝis?“

„Matene. Verŝajne.“

„Kiom da jaroj vi havas?“

„Dek sep. Eble iom pli. Mi memoras, tio estis antaŭ longa tempo, kiam mi sciis, ke mi estas deksepjara. Sed aliajn nombrojn mi kvazaŭ ne memoras.“

„Bone, se dek sep, do dek sep,“ diris la policisto per tia voĉo, ke tio tute ne gravas. Interese, kial li do entute demandis? Tio estis vere stranga urbo, apenaŭ aliloke al li estus enkapiĝintaj tiom stultaj respondoj.“

„Kiun oficon vi havas?“

„Mi ne havas, la ofico havas min.“

„Kie vi laboras?“

„Kiel kuriero en la ministerio por terscienco. Al mi plaĉas tiu laboro. Mi revis pri tio jam dum la infaneco kaj mi efektivigis mian revon. Ĉu ne, mi povas kalkuli min feliĉa homo? Ĉu vi estas kontenta pri la profesio de policisto?“

„Ne estas. Kie vi loĝas?“

„Tion mi vere ne scias. Tion mi bedaŭre ne scias. Mi tre ĝojus, se iu tion esplorus.“

„Kial vi mortigis tiun viron tie sub la volba trapasejo?“

Tiun demandon oni povis atendi. Sed li respondis ridante: „Mi lin ĉiuokaze ne mortigis. Kiu do mortigas sian plej bonan amikon, kiun li krom ĉio vidas la unuan fojon en sia vivo post tio, kiam li estas jam mortigita? Ĉu ne estas logike?“

„En kiaj interrilatoj vi estas kun li?“

„Li kuŝis kaj mi rigardis.“

„Kial vi nomas lin via amiko?“

„Mi simple ne havis aliajn amikojn. Tio estas kompreneble afero de ĉies sento, kiun li kalkulas sia amiko. Vi, ekzemple, ne volus esti mia amiko, vi kalkulus min tro sensignifa, kvankam reale mi tute ne estas sensignifa. Mi kredas, ke kadavroj neniam rifuzas amikecon.“

La policisto longe rigardis lin kaj poste diris: „Jes, vere, mi ne povas esti via amiko, eĉ se mi dezirus tion. La ofico ne permesas.“

„Eble ĝuste pro tio vi ne estas feliĉa en via ofico.“

Fakte tio ne gravis, ne estis lia afero instrui al aliaj homoj, kiel vivi.

„Bone, nun ekiru,“ diris la policisto.

„Kien?“

„Kien vi volas, mi vin ne limigas.“

„Domaĝe,“ suspiris li kaj eliris el la policejo.

La urbo estis tia sama kiel antaŭe. Malhela kaj malvarma. Li staris en la pordo de la policejo, malantaŭ li estis lumo kaj ĝoja vogleco. Kaj iaj sentoj. Sed tiel finiĝas ĉio en la vivo. Kaj tiel preterpasas trajnoj, se vi staras sufiĉe longe proksime de fervojo.

Li ekpaŝis antaŭen. Li iris malrapide laŭ la ĉefa strato, deturniĝis al la Bombogisa strato kaj longe staris sub la volbejo en la loko, kie li estis trovinta sian solan amikon, eĉ tiun mortintan. Ĉu tiu estis viro aŭ virino, bela aŭ malbela, riĉa aŭ malriĉa, saĝa aŭ simpla, ĉu li havis ankaŭ nomon, familion, ŝtatecon, ĉu li parolis kompreneblan lingvon, sur kiu placo povus stari monumento de la forpasinto?

Al ĉiuj demandoj oni en tiu ĉi mondo tute egale ne ricevas respondon. Same kiel ne estas eble longe stari sur unu loko.

Li ekiris. Antaŭen, rekten, dekstren. Estis espero, ke iam li atingos iun alian urbon.

El la libro „En fremda urbo“,  
kiu aperis okaze de centjariĝo de Esperanto.  
El la estona tradukis Antonina Apollo.

### **El la libro „Eraroj de scienco“**

Luc Bürgin

Profesoro de fiziko en medicino Friedrich Dessauer en sia libro „Forscher und Erfinder ändern die Welt“ (Esploristoj kaj eltrovistoj ŝanĝas la mondon) en la jaro 1952 rakontas pri sekva okazaĵo:

En la jaro 1903 mi prelegis en ia societo (...) pri sendrata telegrafio. Furoris en tiu tempo esplorado en areo de norda poluso. Kelkaj ekspedicioj (Amundsen, Peary, Cook) ekvenis vojon kaj por longa tempo malaperis kaj neniu sciis iun ajn raporton pri ili. Mi, ĉe fino de iu vespero, esprimis esperon, ke esploristoj, kiel tiuj pri kies sortoj ni havis maltrankvilon, en plimallonga tempo ni havos kun li per sendrata telegrafio kontakton hejmen, aŭ almenaŭ al homaj sidejoj. La reago estis mira. Presidanto de societo en finaj vortoj esprimis, ke tian troan optimismen imagon oni devas akcepti kiel junecan entuziasmon de la preleganto, ĉar en realeco oni ne povas pri tiaj ebloj eĉ pensi. Tio, kio ŝajnis al sinjoro profesoro tro fantazia, post iom malmulte da jaroj fariĝis realo kaj tiel okazas senĉese ĝis nun.

Ne okazis la unuan fojon, ke teknika evoluo estis forte subtaksata kaj kiel „neebla“ aŭ kiel „nereala“ rifuzita. Fakte eltrovistoj trafas tiajn vidpunktojn kaj rilatojn dum tuta sia vivo. Ili al kutimiĝis kaj nenio haltigas ilin, ĉar ili estas nature optimistoj. Ilia celo ne estas plibonigi malnovajn aĵojn, sed krei ion novan. Ili havas bonan devizon: plej parte ili ne turmentis per faka scienca edukado, ili ne devas movi sin en kadro de konvenciaj manieroj de pensado kaj sciencaj opinioj kaj tio al ili malfermas fascinajn perspektivojn, kiuj por tradiciaj sciencistoj restas fermitaj.

La vivo de eltrovinto estas malfacila, ĉar kiel ĉiuj unuaj li devas prepari vojon por tiuj, kiuj iros post li. Al sciencistoj servas por ilia agado ofte relative bone aranĝitaj institutoj, sed eltrovinto en sia posteno de solulo, baraktas krom kun siaj eltrovaj laboroj ankaŭ kun malfacilaĵoj multspecaj. Li bezonas monon, por ke li povu realigi siajn ideojn, krome li devas rezisti kontraŭ juraj ordonoj, ke li povu akiri ĉiujn kondiĉojn por peto pri patentado de sia eltrovo. Ne laste li devas teni bonajn rilatojn kun mediala mondo. Do aferoj, kiuj ne alportas al li ĝuon, ofte terurigas lin. Krome ofte li sentas danĝeron de aliaj grupoj kaj grandan parton de energio li perdas en rekta barakto kun kritikantoj. Liaj mecenatoj, se li iajn trovus, malcertiĝas kaj ofte lasas lin sen helpo.

Traduko JoDo 2008-03-08

Ĉu Esperanto estas en la sama stato post 120 jaroj? Jes, ĉar ĝi estas eltrovo ege granda kaj la homaro tute ne estas saĝa.

### **Mi estas via donaco**

Irena Obermannová, Ĉeĥio

Mi sidis kontraŭ Zorka kaj ploris: „Kial li forlasis min?“ mi ripetis denove kaj denove kiel malnova gramofondisko difektita, „Kial mi amas lin tiel multe!“

La kristnaskaj festoj furoris kaj kamaradino silentis. Nonstop-refreŝejo estis nur la lasta loko en Eŭropo, kie ne aŭdiĝis kristnaskaj kantoj, tamen eĉ ĉi tie sur ĉiu tableto staris artefarita kristnaska branĉeto kaj rememorigadis al Alice klare, ke ŝi ne povas antaŭ kristnaska etoso eskapi.

„Ne restu dum kristnaska vespero sola“, konsilis al ŝi Zorka. „Vi povas veturi al gepatroj. Ĉu vi povas tion promesi al mi?“

Alice kapjesis. Ŝi devis ĝoji, ke almenaŭ iu ankoraŭ zorgas pri ŝi.

Sed en kristnaska vespero ŝi ŝlosis sian loĝejon preta la tempon tradormi. Sed tio ne sukcesis. Finfine ŝancelante ellitiĝis kaj alportis el balkono malgrandan arbeton, kiun ili aĉetis kun Michal. Momenton ŝi ĝin malamike rigardis. Poste ĝin lasis sen ornamaĵoj por venĝo al kristnasko. Tio iomete helpis. Ŝi sidiĝis sub ĝin kaj ekbruligis kandleton. Ŝi havis nur ununuran deziron.

La sonorilo eksonis. Sur la sojlo de ŝia loĝejo staris nekonata virino. Ĉirkaŭ kvindekjara, haroj kolorigitaj flave kaj nigre lakitaj ungoj. Sen invito ŝi envenis.

„Mi estas via donaco,“ ŝi diris sen akcento.

„Ĉu?“ Alice ne komprenis.

„Mia nomo estas Brůhová. Mi estas sorĉistino kaj kartprofetino“.

Ŝi sidiĝis sub arbeton kaj elmetis paketon da kartoĵoj. Petis Alicen duonigi paketon kaj lerte komencis meti kartoĵojn sur tablon. Ŝiaj okuloj enpikis en okulojn de Alice.

„Ĉu vi vere estas certa, ke vi deziras lian revenon?“

Alice ekmeditis. Subite ŝi ekrememoris malbonajn ecojn de Michal: li tro drinkas, li parolas nur pri si mem, pri ŝi li ne interesiĝas... la imago, ke li denove estus ĉi tie por momento ektimigis ŝin. Sed tio estis vere nur malgranda minuto.

„Tute certe,“ diris firme kaj la sorĉistino denove trapikis ŝin per okuloj. „Se vi pensas,“ ŝi diris. Kaj kiel ŝi venis, tiel foriris.

Alice pinĉis sian vangon, ne certis, ke freneziĝas.

La sonorilo eksonis denove. Ŝi malfermis pordon kiel en sonĝo. Al ŝi falis tute ebrigiĝita Michal.

„Mi alportis ion por donaco,“ li balbutis kaj prezentis al ŝi duonplenan botelon da vino.

„For!“ ŝi ekkriegis kaj elfosis lin per kruro el pordo.

Alice vokis al Zorka: „Imagu, tio estis la plej bela kristnaska donaco, kiun mi neniam ricevis.“

La aŭtorino (\*17.4.1962) estas dramaturgo kaj scenaristo FAMU, aŭtorino de multaj sukcesaj libroj, inter ili „Taglibro de freneza edzino“ (1998) laŭ kiu estis kreita televida filmo. Ŝi kunlaboras kun televido. Somere ŝi prezentis teatraĵon „Ĉiuj en unu lito“.

Traduko: J.Drahotová.

## **Imperatoŝo Konstantino, la viro, al kiu ni dankas pro libera dimanĉo**

Kultureseo de Horakovás en la germana BILD je la 6-a de junio 2007.

Sian bopatron li lasis pendumi, sian bofraton premsufoki, siajn filojn kaj edzinon murdi – ne imperatoŝo Konstantino ne estis sanktulo, Dio, tute ne! Kaj tamen, sen li ni ĉiuj estus paganoj kaj dum sankta dimanĉo ni ne havus liberan tempon, ĉar per sia toleremedikto li legaligis la

kristanisman en la jaro 313, egaligis ĝin kun ĉiuj aliaj religioj – kontraŭe al li antaŭloj persekutis la kristanojn en la romania regno.

Kial do estas la unua kristana imperatoro de Eŭropo (+337) preskaŭ forgesita? Giganta ekspozicio en la urbo Trier aprezas nun tiun viron, kiu siatempe regis imperion de Anglujo ĝis Armenujo.

Laŭ 1400 altvaloraĵoj el (160!) muzeoj – ĉiutagaj iloj (lampetoj, trinkvazoj...), luksaĵoj (oraj ringoj, juvelkestetoj...) ekstreme impresas la dekduetra imperatorstatuo el Romo (rekonstruita) de vizaĝo al vizaĝo oni povas diveni, ke li vere estis Stalino-Mao-miksaĵo, vastevidanta stratego, senskrupula, potencavida politikisto, superstiĉa kaj krima.

Kial oni elektis la urbon Trier? Dek jarojn, kiam la imperatoro regis ĉi tie, estis la kreskanta urbo la centra punkto de la civila mondo (kaj rezidejo de la plej malnova episkopejo de Germanujo). Kiam li forlasis ĝin, komencis la tempo de la „dormanta belulino“.

Naskita estis Konstantino la Granda ĉirkaŭ la jaro 280 en Serbujo. Nelegitime! La patro estis armeestro de la soldatoj, lia konkubino Helena estis kelnerino. En la jaro 306 li lasis sin elkrii imperatoro de la soldatoj, kaj ekde tio li estis devigita defendi sin kontraŭ siaj kontraŭuloj ĝis en la jaro 312 li decidige venkis. Iam frumatene antaŭ la batalego venis al li kruc-vizio, li aŭdis ĉielan voĉon deklami: „Sub tiu signo vi venkos!“

Tio estis lia turniĝo. Ekde tiu tempo li „prizorgis kristanojn, fondis la Petrokatedralon en Romo, la tombopreĝejon en Jeruzalemo, la naskiĝpreĝejon en Bethlehemo, la Sofiapreĝejon en Trier kaj – zorgis en la jaro 321 pri tio, ke la dimanĉo estu semajna libertempa tago, por ke la homoj trankvile povus honori la Dion!

Ĉiu konas la preĝejojn de li, kial ne lin mem? Verŝajne, ĉar li depost la jaro 330 ekloĝis ĉe la orienta limo, en la urbo, kiun li fondis: Konstantinopolo-n, hodiaŭ Istanbulo.

La orienta eklezio lin ankaŭ nun honoras!

„La dektria apostolo mi estas,“ asertis la imperiestro, sed li lasis bapti sin maljuna sur sia mortolito.

El la germana tradukis Josef Nordwalde, Germanujo.

## **Mistero de malgranda subakviĝanto** (novelo)

Alena Müllerová (45)

laboras en ĉeĥa televido, partoprenas dum verkado de novaj elsendoj, regule publicas rakontojn, esejojn kaj felietonojn. En la jaro 2004 aperis ŝia unua libro: „Abomena mondo“.

Tereza estis la plej bela juna virino en eldonejo „Gavia“. Viroj vidante ŝin ekstazis kaj virinoj sopiris aspekti kiel ŝi. Ŝi influis samtempe tenere eĉ sovaĝe. Senkulpe eĉ sekseme. Ŝajnis, ke ŝi ne havas amanton. Kolegino Markéta kreis hipotezon, ke Tereza turmentas pro sia troa ĉarmo, ŝi devas ĉirkaŭkrei baron, ĉar ŝi estas ne nur centro de atentemo, sed ankaŭ de envio. Neniu kuraĝis inviti ŝin por rendenvuo. Post tiu hipotezo kolegoj amase komencis inviti Tereza-n kafumi, trinketi, tagmanĝi, en kinejon, spekti futbalon, en teatron, libertempi, en zooparkon... Sed ŝajnis, ke ekzistas nenio, kio allogus ŝin.

Nur unu viro estis en la eldonejo, kiu ne klopodis ŝin inviti – Radek. Havante hejme junan edzinon, tamen ĉiuj sciis, li ŝatis papiliumi. Kontraŭ lia fideleco neniu volontus doni sian manon en fajron. Post kelkaj jaroj lia edzeco restis sen infanoj kaj tio povis esti la signo, ke io ne estas en plena ordo.

Radek kondukis al Tereza agrable, sed neniam intime. Iam li menciis inter kolegoj, ke li miras kaj ne komprenas kial ankoraŭ neniu el „Gavia“ rendenvuis kun Tereza, eventuale en lito.

Milan aldonis: „Oni scias, ke vi estas konata „Kasanova“, sed eĉ vi mem ĉe Tereza ne

sukcesos.“

„Vetu, ŝi venos kun mi kien mi volos.“

Kolegoj murmuris, sed fine ili vetis kun Radek je kelkaj boteloj de irlanda viskio, ke li ne sukcesos frostan Tereza-n konvinki eĉ al unu rendenvuo.

Post kelkaj tagoj devis Radek viziti pro natursciencaj informoj pri nova eldonserio pri birdoj laborĉambron de Tereza. Nun li ne ridetis al ŝi, mienis spiritforesta kaj iom ĝemis. Tereza komence mienis indiferente, sed post kelka tempo demandis: „Vi aspektas kiel viaj abeloj forflugis de vi.“

Radek de funde elspiris: „Se nur abeloj!“

„Do, kio okazis al vi?“ demandis Tereza.

„Nu, nenio,“ diris Radek, „tio estas mistero.“

„Misteroj interesas min tre,“ vigliĝis Tereza.

„Certe?“ demandis Radek. „Nu, ĉiu virino estas scivola.“

Radek rimarkis, ke Tereza dum komparo kun ĉiu virino iomete frostiĝis. Li rapide daŭrigis: „Tio fakte estas mistero. Psikologia. Sed mi eble ĝenas vin per tio.“

„Ne, ne, ne ĝenas,“ ŝi estis kaptita, „mi origine revis esti psikologo.“

„Ĉu vere? KREDU, mi povas imagi vin kiel psikologo!“ diris Radek. „Vi eble povus la misteron solvi. Sed oni ne povas pri tio babili en oficejo. Kaj vi ne ŝatus iri kun iu el oficejo ester la oficejo...“

„Mi tenas regulon: kio estas en domo, ne estas por mi,“ diris Tereza. „Ĉiuj ĉi tie akceptas ĉion tro persone.“

„Mi komprenas. Do mi devas elturniĝi mem.“

„Vi aspektas malgaje.“

„Jes, mi estas malgaja. Okazis al mi nekomprenebla afero.“

„Nu, ĉu mi trinkus komune kafon?“ demandis Tereza. „Dume ni provos aferon displekti.“

„Ĉu vi pensas?“ hezitis Radek.

„Se vi ne volas...“ Tereza demetis de sia frunto harfasketon kaj Radek eksentis sekecon en gorĝo kaj ekdeziris tuj alproksimiĝi al ŝi.

„Kial ne?“ li raŭkis.

„Je la sesa en kafejo „Ĉe turdo“ kaj rezervu tableton en ĉambreto por pli da intimeco.“

Radek ekĝojiĝis kaj rezervis tableton en la loko, kie ili estus bone videblaj. Li ĝojatendis pri la vetotaj boteloj.

„Komencu,“ diris Tereza, kiam ŝi traflugis kutiman fajron de avidaj okuloj de ĉeestantaj viroj en kafejo.

„Mi rakontos de komenco. Temas pri mia edzino.“

„Mi esperas, ke vi ne rakontos pri malkompreno kun ŝi!“

„Kion vi pensas pri mi? Kun mia Jana mi vivas jam preskaŭ kvin jarojn kaj mi opinias, ke ni estas feliĉa paro.“

„Tion mi ŝate aŭdas.“

„Jana estas ĉarma virino. Mi pensas, ke vi ambaŭ similas unu al la alia.“

Tereza nubmienetis kaj Radek ekkaptis, ke ŝi ne ŝatas, kiam iu komparas ŝin kun iu.

„Vi havas similan aŭron,“ Radek scivole rigardis ŝian reagon. Se ŝi interesas amatore pri psikologio, proksime estas esoteriko. Kaj li vidis, ke li bone celis. Tereza komencis rakonti pri aŭroj kaj horoskopoj. Poste ŝi petis lin rakonti plu.

„Simple, ni tre bone kun mia Janička komprenas unu la alian. Almenaŭ mi pensis ĝis nun pri tio. Ankoraŭ ni ne havas infanojn, ni edziĝis junaj kaj ni volis ĝui la vivon.“ Radek rakontis kiel li kun la edzino vojaĝis, skiadis, paraŝutis. Antaŭ nelonge ili aliĝis por ekzameno pri subakviĝado.

„Janička ŝatas adrenalinsportojn.“

„Tion mi ne ŝatas,“ diris Tereza. „Mi ne aspektas tiel, sed mi estas iomete pigreta tipo. Mi ŝatas legi en lito, aŭ en kuvo.“

Radek klopodis forpeli imagon de Tereza en kuvo. Tia imago devas atendi por pliposto. Li daŭrigis rakontadon kaj kun ĝojo rimarkis, ke du vetintaj kolegoj preteriris. Li rakontis al Tereza kion ĉion kun Jana faris kaj kiel ili komencis plani idon.

„Kaj poste tio okazis. Je la pasinta semajno mi revenis hejmen el la oficejo. Jam dum voje mi havis malagrablan senton. Mi malfermis la pordon, salutis, kaj nenio. Neniu respondis. Ĉio aspektis normale. Sur la forno atendis min varma vespermanĝo, ĉio ordigite, sed io mankis.“

„Via edzino!“

„Jes, ŝi malaperis.“

„Kion vi faris?“ demandis Tereza.

„Mi trovis mesaĝon – Mi foriras, ne serĉu min. Jam neniam mi revenos.“

Tereza subite aspektis seniluziigita.

„Do ŝi normale foriris, eble ŝi havas iun.“

„Sed kial? Ŝi neniam plendis, mi ĵuras. Mi parolis kun ŝiaj gepatroj, kun amikinoj kaj ĉiuj asertas, ke ili komprenas nenion. Kaj strange estas, ke ŝi interkonsentis por ni du subakviĝantan kurson.“

Radek kaj Tereza poste longe interparolis pri la motivo de la foriro de Jana. Kial neniam tuŝis, ke estas iel malkontenta. De kelnero ili petis botelon da vino kaj komencis cii. Tereza konfesis al Radek, ke ŝi en pasinta laborposteno amiĝis al edziĝinta ĉefo, ŝi enplektiĝis en mensogoj kaj kalumnioj kaj fine humilita kaj pereigita devis foriri. Tial ŝi mienas nun malalireble kaj volas rilati al neniu kolego en la oficejo.

Finfine ili interkonsentis, ke la foriro de la edzino de Radek restas sekreto kaj Tereza proponis al Radek elmontri kartojn al li, ĉar tio estas ŝia specialaĵo. Radek pripensis pri eblaj aliaj ŝiaj specialaĵoj. Kiam li ŝin akompanis hejmen, ŝi estis petole ebrieta kaj subtenis sin je li.

„Ĉu vi deziras kuniri al mi?“ ŝi demandis.

Li kolektis siajn fortojn por teni sin. Oni ne devas tro rapidi.

„Terezka, hodiaŭ ne. Mi ne estas en la ordo post tiu katastrofo. Ĉu vi ĉagrenas?“

Ŝi brakumis lin kaj kisis lin.

„Male, nur nun mi kredas vin. La estonto estu malfermita.“

Ili adiaŭis. Li ne sciis, kiel li revenis hejmen.

Li malŝlosis la pordon kaj eniris, haltis en la vestiblo kaj aŭskultis ĉu aŭdos konatajn sonojn de la kuirejo aŭ la loĝĉambro. La loĝejo estis silenta. Li eniris la banĉambron kaj duŝis sin. Fluanta varma akvo trankvilige efikis.

Radek envenis la dormoĉambron. Eĉ ĉi tie estis trankvile. Kun amo rigardis sian dormantan edzinon. Nun, kiam ŝi estas graveda, ekdormas pli frue, kiel oni diras „kun kokinoj“. Virinoj estas tamen specialaj estaĵoj. En animo li preskaŭ ekridegis, kiam li rememoris kion ĉion babilis al Tereza. Precipe pri subakviga kurso!

Aldono de tagĵurnalo Mladá Fronta dnes  
La 23-an de julio 2007

- Noto.

Ĉeĥa vorto „podvodník“ – subakvulo, aŭ subakvonaĝanto – havas la saman sencon kiel trompisto.

*Responde al la mesaĝo al aŭtorino pro permeso pri aperigo de la traduko ŝi sendis al mi pli longan finaĵon de la rakonto, ĉagrenante, ke la gazeto koncizigis ŝian verkon kaj petis traduki originan finaĵon. Do mi kun ĝojo tion faris:*

En animo li preskaŭ ekridegis, kiam li rememoris kion ĉion babilis al Tereza. Precipe pri la subakviga kurso! Nu, etan subakvulon ili nomis bebon, kiu naĝis en ventro de Jana, ĉar sur la foto de la sonofoto de la bebo, sur ĝia vizaĝo ŝajniĝis okulvitroj kaj tubo por naĝi subakve. Radek enlitiĝis apud la edzino. Tre atenteme, ke ne veku ŝin.

Li fermis la okulojn. Li sentis sin agrable. Li gajnis la veton. Li pensis, ke estas bele, ke post jaroj de vanaj provoj kaj meditoj pri artefarita koncepto venos la infano. Li estis feliĉa, ankaŭ pro Janička, kiun li tre amis. Sinkante en dormon, tamen eble tial, ŝajnis al li, ke lia edzino, kiu antaŭ momento trankvile spiris apud li, subite sen klarigo malaperis kaj anstataŭ ŝi aperis en



dormoĉambro plena kuvo de ŝaŭmo, en kiun mergis kaj denove elŝaŭmiĝadis mirinda Tereza..

Tradukis Jindřiška Drahotová

## Pri religio en Irano

Plejparto de irananoj ĝis la 17-a jarcento estis sunaa, sed la dinastio Saffijido proklamis jam en la 16-a jarcento ŝijaan religion ŝtatan.

Ŝijaa religio obeas sep kolonojn de la kredo. Nur la unuajn kvin akceptas sunaanoj. Jen tiuj sep kolonoj: 1. Kredodeklaro, 2. Preĝado, 3. Religia imposto, 4. Fasto dum ramadano, 5. Pilgrimo al Mekka, 6. Protekto de islamaj landoj kaj disvastigado de islamo, 7. Bonfarado kaj malaprobo de kondamnindaĵoj.

Ŝijaan eklezion regas 12 imamoj, kiuj obeas kvin fundamentojn de la kredo, nur unuajn tri akceptas sunaanoj. Jen tiuj kvin: 1. La dio estas unu, 2. Profetaĵo de Mahometo kaj lia posteno kiel la lasta profeto post Abrahamo, Moseo kaj Jesuo, 3. Reviviĝo el morto de korpo kaj animo ĉe lasta tribunalo. 4. Dia justeco, 5. Posteniga rajto kaj regado de islama komunumo pere de 12 neeraremaj imamoj.

Laŭ Zdenek Cvrkal el „Stručná historie státu Írán“ (Konciza historio de la ŝtato Irano) 2007.

## Du fragmentoj el teatraĵo de Václav Havel „Forirado“.

1. Pri kio temas la fragmento?

Juna virino – politologino Bea venas kun admiro al Rieger, kiu havas kelkajn trajtojn de Havel. Pli poste dum ludo Rieger kisas ŝin en altano, kie trovos ilin lia partnerino Irena:

*(Sur la scenejo aperas Bea kun libro en la mano. Dum momentoj ŝi nur staras kaj rigardas Rieger-on, ĝis li rimarkos ŝin.)*

Rieger: Ĉu vi serĉas iun?

Bea: Vin –

Rieger: Kion vi deziras?

Bea: Ĉu vi volontas subskribi libron de viaj prelegoj?

Rieger: Jes, kompreneble –

*(Rieger invitas Bea-n enveni kaj sidiĝi kaj ŝi tion hezite faras. Rieger ankaŭ sidiĝas, elprenas plumon. Bea malfermas la libron kaj metas ĝin antaŭ Rieger.)*

Rieger: Ĉu vi diras, ke vi la tuton legis –

Bea: Jes, legis kaj sufiĉe detale, ĉar estis interese por mi kaj ĉar mi elektis vin kiel temo de mia diploma laboro. Mi elektis vin mem. Mia laboro havas titolon „Demokratio laŭ Vilém Rieger“.

Rieger: Ĉu vi sukcesis?

Bea: Mi gajnis eminente. Mi okupas pri vi jam dum jaroj. Mi scias pri vi eble pli, ol vi mem. Des pli mi okupas pri vi, ju pli forte via laboro impresas min –

Rieger: Ĉu vi estas politologo?

Bea: Jes – sed mi havas eĉ kelkajn semestrojn de multkultura socipsikologio kaj

intermedikomunikado –

Rieger: Ĉu mi rajtas scii vian nomon?

Bea: Weissenmütelhofová. Bea Weissenmütelhofová. Sed vi povas min nomi Bea, sinjoro kanceliero –

Rieger: Ŝate, Bea, sed mi plu ne estas kanceliero –

Bea: Vi ĉiam estos por mi kanceliero, sinjoro kanceliero!

*(Paŭzo. Rieger prenas unu pladon kun fruktoj kaj ofertas al Bea.)*

Bea: Ne, mi dankas, mi ne venis por manĝi kaj perdo de via tempo -

Rieger: Ne gravas, vi ne malfruigas min, prenu –

Bea: Do dankon –

*(Bea prenas pomon kaj kun apetito mordas ĝin. El vilao malbrue venas avino. Rieger kaj Bea ne vidas ŝin. La paŭzo longas, Bea manĝas la pomon..)*

Bea: La pomo estas el via ĝardeno?

Rieger: Ne, La pomojn alportis filino. Ĉi tie ni havas nur acidajn ĉerizojn –

Bea: Vi parolis tre bele pri via ĝardeno – kiel pri simbolo de kultura tradicio kaj kultura pejzaĝo – en Ĥarkov –

Rieger: Aĥ, tio okazis jam antaŭ tre longa tempo! Ĉu mi povas demandi kiuj prelegoj kaj ideoj ekinteresis vin la plej forte?

Bea: Kiel fundamento de via ĉefa vidpunkto de via politiko, sinjoro kanceliero, mi konsideras ideon, ke en la centro de via politiko estas homo, devas esti homo kaj ke ĉio devas direkti al lia multflanka progreso. Tre grava via ideo estis ankaŭ, ke nia lando devas esti sekura loko. Jes, precize tiel tio devas esti! Ĉu la homo povus progresi en iu loko por li malsekura? Ankaŭ mi ŝatas ideon, kiun vi deklaris antaŭ dek unu jaro en Tajvano, ke destino de la homo estas libereco –

Rieger: Jes, mi rememoras, la prelego en tiu tempo havis grandan sukceson – Ĉankajŝek petis de mi manuskripton –

o o o

2. Pri kio temas la dua fragmento:

Bea venas en fino de teatraĵo al kontraŭulo de Rieger – Klein, kiu parte similas al Václav Klaus, samtempa prezidento de Ĉeĥio. Ŝi flatas per tute samaj vortoj

*(Klein rimarkas, ke proksime staras Bea kun libro en la mano. Li haltas.)*

Klein: Ĉu vi serĉas iun?

Bea: Vin –

Klein: Kion vi deziras?

Bea: Ĉu vi volontus subskribi libron de viaj prelegoj?

Klein: Tiun, kiu hodiaŭ aperis?

Bea: Jes. „Demokratio, libereco, komerco kaj mi“ –

Klein: Donu!

*(Bea malfermas la libron kaj donas al Klein, kiu subskribas libron.)*

Klein: Sciu, kion diris al mi dum lunĉo Molotov: „Vlastík, subskribon de via libro neniam rifuzu!“

Bea: Estas mirige, ke vi en la centro de via politiko lasis la homon. Dankon!

## La plej malnova kaj maljuna esperantisto de la mondo ankoraŭ vivanta

Germana Esperanto-Revuo, Legaĵo 5., de la jaro 1959

Je la 1-a februaro 1959 D-ro Anakreón Stamatiadis en Ateno en Grekujo festis sian 92-an naskiĝtagon. Li estas kuracisto kiel lia patro kaj studis en Parizo, de kie li venis al la granda malsanulejo St.Léon en Bayonne en Francujo. Lia patrolando estas insulo Samos, iam turka, poste angla, franca kaj rusa. La princ-reganto de Samos vokis lin kiel ĉefkuraciston-patologon-ĥirurgon kaj direktoron al la centra malsanulejo de Samos kaj kiel apartan kuraciston de la princreganta familio.

D-ro Anakreón Stamatiadis esperantiĝis jam en la jaro 1888, tuj post apero de „Fundamento de Esperanto“ en la lingvoj franca, angla kaj germana, kiun D-ro Zamenhof en la jaro 1887 eldonis en la lingvo rusa. En la jaro 1911 li sukcesis eldonigi en Samos la unuan leĝon en la esperantista mondo pri **deviga Esperanto-instruado** en ĉiuj ses lernejoj de insulo. La tiama Samosa registaro komisiis lin instrui ĉiujn profesorojn kaj geinstruistojn de la insulo, li tion faris kun bonegaj rezultoj. Poste li iris al Konstantinopolo, kie li post sukcesa konkurso eniris en la „Internacian Sanecan Administracion“. Tiu instituto sendis lin al granda lazareto sur la insulo Kamaran, kien ĉiujare venas 60 ĝis 65 mil muzulmanaj pilgrimantoj el la ekstera oriento, restante tie en dektaga karanteno, por ke li poste rajtu iri al Mekka. Sur la Jemen-araba insulo Kamaran Stamatiadis skribis franclingve la grandan verkon „Camaran“ pri moroj kaj kutimoj de la Araboj de Jemen kaj Assir kun franca-araba vortareto kaj frazeologio en dek dialektoj ekstremorientaj. Post kelkaj jaroj li reiris al Konstantinopolo, kie li fondis Konstantipolan Esperanto-Asocion „Bizantio“, kiu eldonadis trilingvan samnoman ilustritan periodaĵon. Dum la unua mondmilito lin nomumis komandanto de la granda hospitalo Giil-Hané, kie li laboris kun du germanaj kuracistoj – ĥirurgo Brünning kaj patologo Zelich. Post la milito li kuracis turkan ĉefministron Ahmed Fesrfik Paŝa, kiu rekomendis lin al la lasta sultano Sanit-Eddine. Tiu nomis lin oficiala reprezentanto de la turka registaro ĉe la „Supera Internacia Saneca Konsilantaro“.

Post 30-jara servo D-ro Stamatiadis emeritis translokiĝante kun edzino kaj solfilino al Ateno. Tie li fondis la „Esperantan Helenan Esperanto-Instituton“, kiun li prezidis dum 33 jaroj. Ankaŭ la „Helena Esperantista Asocio“ estas lia verko, kies prezidantino estas lia filino s-ino Roksan Manoussou. Dum 44 jaroj li jam eldonas la gazeton „Helena Esperantisto“, kiu nun nomiĝas „Esperanta ideo“. Danke al sia penado enkonduki la Esperanto-instruadon en ĉiuj lernejoj de la greka ĉefurbo, li atingis, ke ĉiu nova kulturministro eldonas apartan cirkuleron rekomendante la Esperanto-instruon. D-ro Stamatiadis instruas jam 33 jarojn tute senprofite Esperanton en multaj altlernejoj de Ateno, elspezante multajn monojn nur por transporto al la ekstremaj anguloj de la urbo.

Krom la verko „Camaran“ D-ro Stamatiadis eldonis en novhelenan lingvo du volumojn „Esperanto-metodo“ en 6-a eldono kaj „Nova gramatika libro“, „Greka-Esperanta Vortaro“ kun „Esperanto-Greka Radikaro“. Greklingve li ankaŭ publikigis la dikan verkon „Delfinosimi-Genealogi-historio“ kun 180 bildoj personaj, en kiu li priskribis siajn 5000 familiajn antaŭulojn de la jaro 1620 ĝis nun.

D-ro Stamatiadis promesis al nia majstro D-ro L.Zamenhof je la 5-a Universala Kongreso en Barcelona ĉiam lukti, labori kaj propagandi por Esperanto. Li oficiale reprezentis sian patrolandon Samos, pro kio D-ro Zamenhof sincere gratulis al li.

Ni esperu, ke nia fervora greka samideano vivu ankoraŭ multajn jarojn, por ke li povu labori

kaj venki por nia bela lingvo! Ni dankas al la altjaraĝa jubileulo pro lia bonega laboro en la servo de nia ideo kaj deziras multan sanon kaj ĉion bonan!

Vivu longe, D-ro Anakreón Stamatiadis!

## **Kun dorsosako kaj Esperanto al Ĉuvaŝio**

En semajnorevuo MARE de la Universitato de Leiden en Nederlando esperantisto Martin Dijkhuijsen raportas pri siaj kontaktoj kun la mondo. Li estas studento de la rusa lingvo kaj antaŭ kvin jaroj konatigis lin amikino kun Esperanto. Intertempe li parolas flue kaj preskaŭ ĉiutage. Li partoprenas internaciajn Esperanto-kongresojn kaj vizitas esperantistojn ĉie en la mondo.

En la artikolo estas menciita la fama nederlanda televidkurso pri Esperanto en 70-aj jaroj, kiu tamen ne povis halti la malkreskon de la nombro de esperantistoj en Nederlando. Martin, kun socialista fundo, apogas la originalan ideon: solvo de la internacia lingva problemo. „Estus multe pli honesta la enkonduko de Esperanto kiel monda lingvo. La hodiaŭa situacio estas, ke Usono kaj Anglujo profitas de la fakto, ke la angla estas la monda lingvo. Unue, ĉar ili ne bezonas lerni fremdajn lingvojn en la lernejoj, due, ĉar en internaciaj diskutoj ili ĉiam estas multe pli fortaj, la angla ja estas ilia gepatra lingvo. Li klopodas entuziasmigi kiom multe la junulojn kiom eble por Esperanto. Ju pli da homoj parolas Esperanton, des pli la enkonduko faciliĝos.“

Por li estas la ĉefa kialo por lerni Esperanton „aventuro“ kaj ne idealismo. Kiel vojaĝgvidilon li uzas la libreton kun adresoj de esperantistoj ĉie en la mondo, kie li povas gastigi senpage. Li jam vizitis Pollandon, Francion kaj Rusion. „En Hago mi prenis aŭtobuson al Varsovio por viziti esperantistojn, kiujn mi tute ne konis. La sekvanta haltejo: Moskvo, kie mi ankaŭ loĝis ĉe esperantisto. Mi vere vizitas personojn hejme, de la plej malriĉaj ĝis la plej riĉaj.“

Martin ankaŭ vizitis Ĉeboksary, esperanto-bastiono en Rusa federacia respubliko Ĉuvaŝio. En urbo troviĝas pli ol 200 junaj esperantistoj – pli ol en Nederlando kaj Belgio kune. Sed inverse ankaŭ esperantistoj loĝas ĉe Martin – ekzemple brazila studento de medicino.

Estas tamen unu granda malprofito de la idealo „Esperanto“. Kiam unutage ĉiu en la mondo parolus la saman lingvon, finiĝus la speciala sento de familio. „Estus la fino de la originala kulturo de Esperanto. Oni ja ne iras al Anglio por ie frapi sur la pordo dirante: Mi ankaŭ parolas la anglan. Ĉu vi permesas, ke mi loĝu ĉe vi?“

Verkis Arjen van Veelen  
laŭ MARE 2004-11-25 (nl).

## **Komato**

De D-ro Emil Feist, Bayreuth.

Kia granda plezuro estas stiri aŭtomobilon dum tiel belega, somera mateno. La suno brilas, sed ankoraŭ ne estas varmego, kvankam kelkfoje oni povas vidi spegulbildon de la vojo fore.

La ĉielo estas admirinde blua, kelkajn ŝafidformajn nubojn ordonadas nevidebla ŝafisto.

Mi bonfartas.

Baldaŭ mi atingos la aŭstran limpasejon, mi esperas, ke ne devos atendi longe. De kiam ankaŭ ni, hungaroj fariĝis eŭropuniaj civitanoj, povas vojaĝadi pli facile ene de la Unio. Kvazaŭ malaperis la landlimoj, nur la lingvaj limoj restadis. Mi ne regas la germanan lingvon, eĉ aliajn naciajn lingvojn mi ne scipovas. Bonŝance, ke dum Esperanta renkontiĝo ne gravas de kie vi venis, kiun lingvon vi

parolas. Ĝis mi atingos mian celon, mi uzos la internaciajn mansignojn por komprenigi min. Mi eĉ ne povas imagi, ke mi renkontus ulon esperantoparolantan dum mia vojaĝo.

Jen, ĉi tie estas informtabulo, kiu anoncas, ke baldaŭ mi atingos finon de la aŭtostrado, sekvos aŭtovojo kaj poste ĉefvojo. Mi ŝatintus, se iu el nia klubo estus ĉeestanta, mi ŝategas interparoladi. Tiel ĉi nur mi povas konversacii kun mi mem, hm... mi estas bona interparolanto, he - he - he. Nu, fine mi atingis la limstacion. Ŝajne, ĉiu kaj ĉio estas trankvila, hastas nerveze neniu, tio estas bona signo. Alta, sunbrunigita lingardisto proksimiĝas al mi.

- Bonan tagon! Bonvolu montri al mi vian personan atestilon.
- Jen!
- Kien vi veturas?
- Mi veturas al Esperanta Arango, Vieno.
- Ho! Mi jam aŭdis pri tio, tio estas iaspeca artefarita lingvo, ĉu ne?
- Jes, tiaspece.
- Bonan Vojaĝon! - kaj li redonas mian atestilon.

Mi startigas mian aŭton malrapide, mi ne hastas, nun mi jam havas iom da tempo. Mi rigardadas la apudvojan pejzaĝon, kiel bela kaj pura ĉio ĉi tie! La aŭtotrafiko estas sufiĉe granda, kelk uloj veturadas ege rapide, ĉiuj hastas al ie. La ŝoforoj preterveturas unu la alian danĝere, kiel ekzemple tiu kontraŭe. Oj, tio estos tre danĝera, ve-ve, tio certe ne sukcesos...

Kio okazis? Kie mi estas? Ĉio estas malkonata por mi. Mi kuŝas en fremda lito, vestita en fremda piĝamo. Estas duonmalhelo, aŭ mi vidas malbone? Mia cerbo komencas vekigi, eĉ miaj sencoj ekfortiĝas. Hm, mi sentas hospitalodoron. Kial mi estas ĉi tie? Mi memoras nenion. Mi aŭdas voĉojn de ekstero, mi komprenas nenion el la parolado. Ŝajnas al mi, ke oni parolas germane, sed mi ne certas. Malfermiĝas la pordo kaj enpaŝas flegistino.

- Kiel vi fartas? - demandas ŝi.
- Mi fartas sufiĉe bone - mi respondas aŭtomate.
- Kie mi estas? - mi interesiĝas malcerte.
- Vi estas en hospitalo, en Vieno. - diras ŝi iom ridete.
- Kiam mi enhospitaliĝis? - mi daŭrigas vicon de la demandoj, kaj subite bombas la rekono en mia cerbo, kiun lingvon ni uzas. Ja mi konversacias Esperante en viena hospitalo.
- Ó, jam tre antaŭ longe. Vi estas ĉi tie de 15 jaroj. Vi estis en komato ĝis nun.
- Vi bone parolas Esperante - mi konstatas nur flanke.
- Kio okazis al mi?
- Vi havis teruran aŭtoakcidenton, kaj oni portis vin ĉi tien.
- Kiel bona afero estas tio, ke vi parolas la lingvon internacian. Ni ne povus komuniki alimaniere, ĉar mi ne scipovas paroli germane - mi diras kontente.
- Ho, kompreneble, ĉi tie ĉiuj parolas Esperanton. Ó, mi nun enmemoriĝas, ke vi ankoraŭ ne povas scii pri la granda lingva ŝanĝiĝo, kio okazis jam antaŭlonge.
- Hm...? Kiun ŝanĝiĝon mi ne povas scii? - mi demandas senkomprene.
- Antaŭ 13 jaroj Eŭropa Komisiono decidis, ke en ĉiuj membroŝtatoj oni devas enkonduki la instruadon de esperantlingvo en la bazaj lernejoj. Pli poste Esperanto fariĝis pontolingvo inter la nacioj. Nun jam ĉiuj en Eŭropo parolas sian nacian lingvon kaj Esperanton. - ŝi klarigas entuziasme.

Ho, mia Dio, do tamen sukcesis! Ja ni luktis ĝuste por tio dum jardekoj, apenaŭ mi povas kredi tion. Do, tamen la esperantistoj sukcesis konvinki la registarojn, ke ne ekzistas alia solvo por atingi la lingvan egalecon. Mia flegistino rimarkis mian subitan entuziasmon, kaj tiel alparolis min:

- Mi pensis, ke vi estos ĝojanta pro tio. Mi sciis, ke vi estas esperantisto, mi vidis vian verdan insignon sur via jako. Mi nun devas iri por raporti vian „reviviĝon” - kaj ŝi forlasis la ĉambron.

Mi restas sola kun miaj kirliĝantaj pensoj. Mi provas movi mian piedon, sed ne sukcesas. Mi provas movi mian manon, eĉ tio ne sukcesas. Ŝajne, ke mi bezonas iom da tempo por regeneriĝi. Subite mi sentas fortan pisemon. Mi devus signi iel al la flegistino. Mi rigardas maldekstren kaj mi rimarkas la butonon de sonorilo. Mi devas atingi tiun aĉan vokilon. Ordonante al mia cerbo mi

malrapide levas mian maldekstran brakon, kaj premas la butonon. Kio okazas? Ja la sonorilo sonas apud mi. Mi eksaltegas el la lito, preskaŭ mi surfalas la plankon pro la subita kapturigo. Dio mia, mi nur songis ĉion? Mi ĉirkaŭrigardas, ho jes, mi estas hejme, kaj la vekhorloĝo nur diras sian kantaĉon daŭre.

Mi residas sur randon de mia lito, pli trete ol trote mutigas la vekhorloĝon. Ankoraŭ lumineskas la songbildo en mia cerbo, sed nur jam pale. Kiel interesa estis tiu ĉi songo!

Domaĝe, ke ankoraŭ nun ni nur songas pri tiu mondo!

## **La vorto kredo**

Kiam vi aŭdas la vorton kredo, oni povas imagi multon da diversaj sencoj kaj interrilatoj: „Mi kredas nur al mi mem.“ „Mi kredas al neniu kaj al nenio.“ „Mi kredas al miaj gepatroj.“ „Mi kredas al sciencistoj, kuracistoj, instruistoj, policistoj...ĉar ili estas edukitaj, ili estas profesiuloj.“ „Mi kredas al iuj politikistoj, ĉar ili plenumas programon, kiu plaĉas al mi“.

Jes, la kredo povas havi multajn aspektojn. Kaj la homo povas esti iam afliktita el tio, en kion li kredis. Homaj modeloj ŝanĝas, jen spertoj edukas nin, ke homoj ne estas tiaj, kiel ili aspektas, kiel ili ŝajnigas al ni, promesoj de amikeco kaj amo kaj solidareco bedaŭrinde ofte malfortiĝas kaj ŝanĝas al kruela malamo kaj doloro de koro. Ne ĉiam devas aferoj ekscesiĝi, iaj aferoj simple malproksimiĝas kaj oni vidas la mondon ankaŭ el alia vidpunkto. La homo povas poste eĉ honti konfesi, ke ili iam kredis modelojn kaj promesojn kaj agis laŭ bazo de tia kredo.

Iu maljuna monaĥo rakontis al novmonaĥoj historieton pri junulo, kiu vagadis de monaĥejo al monaĥejo. Ĉiam restis kelkajn tagojn kaj poste malkontente foriradis kaj petis akcepton en alia monaĥejo. La junulo sentis, ke ne povas resti kaj koncentrigi sin pro preĝo, ĉar ĉie oni flaras la saman malodoraĉon. Sed tio ne estis problemo de la monaĥejoj, la malodoro devenis el hundaj fekaĵoj per kiuj la juna monaĥo iam malpurigis sian veston kaj malzorgeme lavis ĝin. La malodoro akompanis lin kaj ĉiam, kiam venis voje en iun monaĥejon, la ĉelo, kiun li ricevis por dispono, plenigis per malodoraĉo ...Tio estis lia problemo...

La similan malkontenton travivas en nia tempo multaj homoj, ili serĉas diversajn aranĝojn, spiritajn mastrojn, ŝanĝas subite kristanismon je buddhaismo aŭ hinduismo, sed neniam restas longtempe, nenian libron legas ĝis la fino, nur elektas citaĵojn, kiuj sonas plaĉe kaj ne ĝenas, rapide lernas skalon de fakaj terminoj, sed poste lasas ĉion. Kial nun tio tiel ofte okazas? Ĉu la homoj estas samaj kiel tiu junulo akompanata per sia malodoro de egoisma surpraĵeco?

Ignatius, aŭgusto 2007

Hvězda naděje – křesťanský list pro alternativní informování.  
(Stelo de espero – kristana gazeto por alternativa informado).

## **Sindikato kritikas reciprokajn lingvajn obstaklojn de luita personaro el eksterlando**

La nombro de tiu personaro en entrepreno ŠKODA-AUTO nun estas ĉirkaŭ 3.900. Sed problemoj pligrandiĝas. Ne nur ombudsmano (ŝtata oficisto pro plendoj de civitanoj) provis solvi plendojn de tiuj laboristoj el Pollando, sed aperis pluraj plendoj en filio de entrepreno „Kvasiny“ pro konduto de estroj al laboristoj kaj pro maljustaj salajroj. La problemoj en Mladá Boleslav senĉese profundiĝas kaj laboristoj plendas pri lingvaj obstakloj.

Ekzemple Aleš Vít, estro de fakejo n.9, kie oni muntas aŭtomobilojn „Fabia“, konstatis en

entreprena komisiono, ke estas normale, kiam en unu skipo laboras poloj, ukrainano, rusoj kaj vjetnamoj kaj ili ne eblas interkonsenti. En tiu laborejo estas grandaj sanaj riskoj kaj tiuj homoj ne povas legi regulojn kaj tenadi metodojn. Estas tre malfacile atentigi ilin pri danĝero. La lingvaj obstakloj ankaŭ detruas trankvilon el homa vidpunkto, se ne paroli pri kvalito de fabrikado. „La laboristoj suferas per tio,“ diris Vít.

Prezidanto de estraro, Detlev Wittig, akceptis tiun ĉi riproĉon kiel pravan kaj konsentis, ke la problemoj eĉ pligrandiĝos. La sama problemoj ne estas nur en ŠKODA, ankaŭ liverantaj firmaoj havas la samajn problemojn. „Tio estas „pakaĵo de taskoj“ por fakejoj, kiu laboras pri personoj,“ diris Wittig.

„Ne temas pri babeloj de nacioj, sed pri babeloj de lingvoj. Laboristoj ofte ne havas tempon iomete konatiĝi kun laboro dum tri tagoj. Tiuj homoj ne scias komuniki. Ili ne povas legi regulojn kaj instrukciojn, kiuj ofte ŝanĝiĝas kaj en tiu momento komenciĝas problemoj. Dum pasinta reĝimo devis eksterlandaj laboristoj partopreni lingvan kurson dum 3 monatoj kaj akiri diplomon,“ diris prezidanto de entreprena sindikato Jaroslav Povšík.

Prezidanto de estraro ankaŭ konfesis, ke la firmao faris malmulte por la eksterlandaj laboristoj sur areo de kulturo en Mladá Boleslav en kadro de iliaj kutimoj, kiel oni komence promesis. Li laŭdis la klopodon de sindikato kaj konsultiga centro, ke estis kreita loko, kie tiuj homoj povas turni sin.

Týdeník odborové organizace OS KOVO ŠKODA AUTO a.s.  
(Semajna ĵurnalo de sindikato en entrepreno ŠKODA AUTO a.s.)  
20.9.2007, jarkolekto XIV numero 31.

Noto:

En ŠKODA AUTO oni parolas plejparte germane, ĉeĥoj amase lernas tiun ĉi lingvon, ĉar firmao VW plejparte aĉetis la firmaon ŠKODA. En lernejoj infanoj plejparte elektas por lerni la anglan lingvon.

Traduko J.Drahotová.

## Ĉu vi volas elekti virinon prezidanto? Do ŝanĝu konstitucion!

Ĉu lingvaj strangaĵoj de la ĉeĥa lingvo?  
El tagĵurnalo Mladá Fronta – 23.11.2007 paĝo 22/23  
[www.e15.cz](http://www.e15.cz)

Agentejo Gaia, kiu pledas por samrajteco de virinoj venis kun postulo de ŝanĝo de konstitucio en kadro de la „lingva samrajteco“, ĉar ĝi estas verkita en vira genro kaj tiel eliminis virinojn el socio: „La konstitucio de la Ĉeĥa respubliko estas absolute vira dokumento, kie postenoj estas priskribitaj nur en vira genro.“

Tion skribis Marie Haisová, „vedoucí“\* de projekto „Quo vadis, femina?“ Laŭ ŝi, la teksto de konstitucio deklaras, ke en Ĉeĥio oni elektas prezidenton, sed ne prezidentinon.

Sian postulon sinjorino Haisová klarigas: „La lingvo reliefas realecon kaj estas tre grave, ke leĝoj estu samrajtece justaj.“ Plu ŝi argumentas per sciigo, ke ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj okazas ŝanĝoj. En Aŭstrio, ekzemple, oni klopolas efektiviĝi alparolon „civitanoj kaj civitaninoj“, „senatoroj kaj senatorinoj“.

Transkriboj de konstitucioj ne estas io nova. Jam pri tio komencis germanoj per anstataŭo de vorteto „man“, kiu estas simila al „Mann = viro“, sed ĝi fakte servas por esprimo de necerta ĉeĥa „se“. Germanaj genderistinoj postulis ankaŭ ŝanĝon de ŝtata himno, ĉar oni kantas pri patroj kaj

fratoj, kaj ne pri patrinoj kaj fratinoj...

La ĉeĥa lingvo kun sia speciala morfologio devas nek honti nek peti pardonon kaj tute ne korekti konstitucion per duopoj „vira/ina“ perforte. Krome, ne ĉiuj vortoj posedas inan formon – ekzemple „blázen“ – frenezulo, „slepec“ – blindulo, gasto – „host“...krome, nedisputeblaj estas vortoj homo- „člověk“. Kaj fine parlamentano aŭ prezidanto – dependas do pri konteksto!

Tio estas kialo, ke en ĉeĥa konstitucio povas resti frazo: „prezidanton oni elektas...“ sen malpermeso elekti virinon kaj poste alparoladi ŝin: „paní prezidentko“.

Ivan Straka – ĵurnalisto  
enesperantigis J.Drahotová

\*La vorto vedoucí –( mastro aŭ estro) – havas la saman formon en vira kaj ina genro – en bela ĉeĥa lingvo.

## VIKIPEDIO

Neringa Zasaité

Wikipedio (<http://wikipedia.org>) estas plurlingva, libera interreta enciklopedio, pri kiu kunlaboras volontuloj de la tuta mondo.

Historio

La projekto naskiĝis la 15-a de januaro 2001. Komence ekzistis nur angla-lingva versio, sed la projekto rapide iĝis plurlingva (*wiki* estas havaja vorto „rapida“). La 6-an de novembro 2001 Chuck Smith fondis la Esperantan version. Nun ĝi enhavas 90 mil artikolojn.

Ĝia valoro

Kritikistoj asertas, ke permeso al kiu ajn redakti Vikipedion faras ĝin nefidinda. Oni opinias, ke ĝi estas taŭga por informiĝo, sed ĝi neniam estos vera enciklopedio. El alia flanko Wikipedio estas laŭdata pro tio, ke ĝi ebligas aktualigadon de artikoloj, aŭ novaj artikoloj estas kreataj kiel reago je certa evento.

Kaj kiel kunlabori pri la projekto?

Malgraŭ tio, ke Esperanto-parolantoj estas malplimulte nombraj ol parolantoj de aliaj lingvoj, en ĉi tiu multlingva projekto Esperanto aperas inter la plej gravaj lingvoj de la mondo.

Redakti Vikipedion rajtas ne nur sciencistoj aŭ fakuloj. Se vi interesiĝas aŭ spertas pri iu fako, informu aliajn homojn pri ĝi. Krome, verkante aŭ tradukante vi ekzercas Esperanton. Por multaj homoj kontribui al Wikipedio estas ŝatokupo. Oni verkas pri temo, kiun oni ŝatas, ekscias pli pri ĝi kaj malkovras mirindaĵojn.

Wikipedio estas pli kaj pli uzata. La internacia serĉilo Google favoras rezultojn en la enciklopedio, do ofte montras ilin plej supre inter la diversaj serĉ-rezultoj. Antaŭnelonge aperis manlibro pri Wikipedio, verkita de Yves Nevelsteen. La 40-paĝa libreto aĉetebla ĉe UEA por 3 eŭroj. Pli da informoj pri tiu ĉi projekto vi trovos en la retejo <http://vikio.ikso.net/wikipedio>.

Juna amiko, 34-a jaro, n-ro 3/2007 (120) decembro 2007 paĝo 45  
Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanaj kaj komencantoj.

Ĉu vi scias, ke esperanta VIKIPEDIO aperis pli frue ol la ĉeĥa?  
Pri ambaŭ meritas Miroslav Malovec, honora membro de ĈES.



## Ni ĉiuj estas fremduloj

Dr. Jiří Kučírek

Ni estas ĉi tie hejme kaj tiuj, kiuj alvenas estas fremduloj, danĝeraj al niaj privateco kaj vivo. La timo antaŭ fremduloj kaŭzas grupiĝon en naciajn grupojn kontraŭ aliaj – kontraŭ fremduloj, tio estas signo de timo el nekono. La fremdulo estas alia kaj kiu estas alia, estas ankaŭ suspekta laŭ regulo: Tiu, kiu alvenas de ekstero, estas malpli bona – atentu lin! Ni estas ĉi tie hejme, ni estas pli bonaj.

Kial? Simple pro tio, ke ni loĝas ĉi tie kaj konas unu la alian. Ni scias kion ni povas atendi de proksimuloj – per kiu malbono ili povas nin regali, sed pri fremduloj ni tion ne scias. Fakte fremdulo ne estas malpli bona, ni nur ne scias kiel li kondutos. Ni preferas malbonon de konatuloj ol de nekonatuloj. Indiĝenoj ĉe ni imagas en fremdulo necertan elementon, kiu povus detrui kutimojn kaj tradiciojn. Sed ĉiu el ni estas fremdulo sur nia Tero, en nia vivo estas nur hazardo kie ni loĝas. Ni ĉiuj envenas en la mondon kiel fremduloj, nur ni estas ĉi tie pli frue ol tiuj aliaj. Estas aŭdaco serĉi por si lokon por sia plua vivo. Se oni serĉas novan hejmon, ili ie elradikiĝis, do estas danĝeraj! La danĝero estas kaŝita en eblo disvastigadi ideon, ke oni devas kutimajn aferojn ŝanĝi – fremdulo simbolas eblon de alia vivo. Ni naive imagas al si, kiam ni pelos fremdulon de nia sojlo, ni forigos nian propran malbonon.

Tamen la veron pri ni mem ni povas trovi per fremdulo. Nia rilato al fremdulo estas rilato al mondo. Nia manifestado de nacieco estas manifestado de malalteco, anstataŭ racio parolas sango: Se mi nenion valoras, kiel ano de nacio mi estas io pli. Kaj kiel ajn malalta mi estas, tiel pli multe mi devas substreki mian naciecon, mian devenon. Estas mensogo, se iu diras, ke ne temas sole pri li, sed pri nacio. La loko sur la Tero sur kiu ni paŝas ne apartenas al ni, apartenas al ĉiuj, kiuj sur ĝi paŝas – por la Tero ni ĉiuj estas fremduloj. Same kiel fremdulo venos kaj foriros, eĉ ni venas kaj foriras de la Tero. Ni venis al mondo kaj eĉ ni neniam foriros el nia urbo aŭ vilaĝo, tamen ni iam foriros al alia mondo. Nur tiu, kiu foriros de sia hejma vilaĝo aŭ urbo kaj estiĝos fremdulo, ĉe reveno vidos ion, kion li neniam povus vidi, se li ne forirus. Nur fremdulo vidas tion, kion indiĝenoj neniam ekvidos. Se vi volas scii ion pri si mem, invitu fremdulojn. Estimiu ilin kaj ne prijuĝu ilin pri iliaj impresoj kaj alieco, per tio ni povas nur gajni. Ĉio povas esti alie...

## Lingva opinio de flegitino

Mi pli kaj pli opinias, ke la lingvo, la nacia lingvo povas esti plene komprenita al nacioj nur per propraj, naciaj, klaraj vortoj, kiujn kompreneble povas kompreni nur samnacionoj. Se la vorto estas ŝajne transprenita sen ŝanĝo el alia lingvo, ricevas ĉiam delikatan propran nuancon. Iam de moda eksceso, iam nuancon de malŝato, iam ĝenerale influan povon, sed ĉiam ĝi enhavas esprimon de popola opinio, do neniam ĝi havas pure saman enhavan signifon. La proprigita vorto estas ĉiam iel malproksimita de origina vorto mem kaj estas akceptita blinde, neelradikige ĉiam ripetata kiel vorto de papago.

Tion mi eksciis unue, kiam mi komencis lerni en bazlernejo la rusan. En la rusa lingvo mankas la idiomato *mi havas*. Rusoj diras: *ĉe mi (у меня)* kaj *ili havas (они имеют)*. Tuj mi sentis, ke la socio en „vasta rusa lando“ estas alie disdividita, ol en patrujo mia. Sed mi estis infano kaj mi akceptis, kion oni proklamis al mi kaj ne meditis pri rusa maniero esprimi sin, interesis min aliaj, pli gravaj aktualaj problemoj ĉiutagaj.

Poste, multe pli poste, dekojn da jaroj, kiam mi komencis lerni Esperanton, mi trovadis similajn strangajn lingvajn ekzemplojn en mia geparda lingvo, sufiĉe gravaj diferencoj inter nocioj. Mi komencis ilin noti, sed ne sisteme. La plej okulfrapa estis por mi kreado de vortoj. Vidu: *skribmaŝino, lavmaŝino*, en Esperanto glate faritaj. En la ĉeĥa la skribmaŝino – *psací stroj* sed tute neeble oni povas diri same pri lavmaŝino - *pračí stroj*, oni diras *pračka*, tamen oni tute ne povas diri

*psaĉka* pri skribmaŝino. La kreado de vortoj estas ŝajne facila, eĉ facile esprimeblaj, sed neniu ĉeĥo ilin uzus.

Tio estas nur vortludoj. Pli serioza estas transprenado de abstraktaj vortoj: *kulturo - kultura, tutmondiĝo - globalizace, civilizacio - civilizace, identeco - identita*. Tiuj vortoj ne plene enhavas, laŭ mia opinio, la saman signifon, kian oni supozas en aliaj lingvoj kaj precipe en lingvoj de nacioj, kiuj estas portantoj tiujn ĉi kulturajn, tutmondajn, civilizajn ideojn. Ĉeĥoj ne kreis ĉeĥan ekvivalenton al tiuj vortoj, do mi aŭdacas aserti, ke oni perceptas tiujn ĉi vortojn ne tute klare kiel en landoj, kie tiuj vortoj estas hejmeccaj, oni ilin ne proprigis ĉe ni. Tiajn vortojn facile oni povas misuzi „politike“ por konfuzi la publikon.

En samtempo mi konsideras la plej gravan manipuladon de la publiko per vorto *odveta* – revenĝo kaj la vorto *pomsta* – venĝo. *Pomsta* estas vorto, kiu esprimas ion teruran, nekristane faritan, nedemokratian, kiu donas al kontraŭulo nek eron da vero, nek eron da rajto. *Odveta* sonas pli dece, preskaŭ ĝentile kaj rajtigite, sed bedaŭrinde la vortoj estas fakte logike la samaj per sia enhavo.

Dum longa ĉeĥa historio oni akceptadis vortojn sub germana influo, de fama malvenka batalo 1620 sur „Blanka monto“ – *Bílá hora*. Post la jaro 1620, la lando estis regata de aŭstria aŭtoritatoj kaj ofica lingvo estiĝis la germana. Tamen nia lingvo ne velkis, male ĝi reviviĝis kaj fortiĝis post tri centjaroj, ĝis denove estis starigita memstara ŝtato 1918. Eĉ la lingvo havis tiel multe da forto, ke helpis al niaj slovakaj fratoj krei ilian skriban lingvon. Lingve ni neniam bezonis difini diferencon inter venĝo aŭ revenĝo. En nia lando ni ĉiam lernis lingvon de niaj „kontraŭuloj“ (*ĉu la homo rajtas al alia homo esti la kontraŭulo, vivante en la sama domo, sur la sama strato, en la sama urbo, en komuna ŝtato, sur unu terglobo?*) Ni ne perdis sian identecon, nian lingvon, malgraŭ nazia trudo, malgraŭ „amo“ de Ruslando kaj malgraŭ de homa eco - ŝafe sekvi la „sinjorojn“. Kaj simile nun en la fundo de nia animo travivas la ĉeĥa identeco invadon de la angla, sed pri la identeco mi ne timas, ĉar nia homo naskiĝas kun karaktero de „brava soldato Ŝvejk“.

Kaj la Esperanto? Ĝi povas multe klarigi, ja, temas pri helplingvo! Sen ĝi mi pri tiaj aferoj vere ne meditus.

Jindřiška Drahotová 2002.

## Ni lernu el la eksjugoslaviaj eraroj

Zlatko Tišljar – letero al eŭrokomisiano Margot Wallström,  
septembro 2007.

Jugoslavio estas tre bona ekzemplo por lerni ion rilate al lingva politiko en plurnacia federacio. Pro tio, ke en Jugoslavio oni same kiel en EU lasis la decidon pri lingva praktiko al la merkato, kvankam same kiel en EU ĉiuj naciaj lingvoj estis egalrajtaj, la praktikata komuna lingvo en la federaciaj instancoj kaj en la armeo estis la plej forta lingvo, do la serba varianto de la serbokroata lingvo.

Kvankam multaj lingvaj solvoj en eksjugoslavio estis multe pli bonaj ol en granda plimulto de la nunaj EU-ŝtatoj (mi menciis nur ke la romaoj en Makedonio havis siajn lernejojn, radion kaj teatron, ke la regionoj de hungara kaj itala minoritatoj en Slovenio havis devigan reciprokecon – do ankaŭ la slovena majoritato en tiuj regionoj devis lerni la lingvon de la minoritato) tamen la fakto, ke la neoficiala praktiko signifis, ke por avanci en politiko oni devis bone koni la serban, kaŭzis ke la politika elito disdividiĝis je du partoj: tiuj, kiuj bone konis la serban kaj povis avanci en siaj karieroj kaj tiuj, kiuj ne konis bone la serban kaj tial devis resti en siaj regionoj. Dum jardekoj tiu ĉi dua elito pro la malkontento daŭre evoluigis negativan bildon pri la federacio en la okuloj de sia regiono, sekve influis esence al fortiĝado de la regionaj kaj naciaj naciismoj. Kiam fortiĝis ankaŭ politika krizo, tiam ĉi tiu naciismo kaŭzita de la lingva malegaleco detruis Jugoslavion.

Mi timas ke EU simple ripetas la saman eraron. Oni teorie proklamas lingvan egalecon de ĉiuj ŝtataj lingvoj sed oni lasas al la merkato decidi pri praktika lingva uzo, kiu kompreneble, jam

efektivigis la proceson pri establiĝo de la angla kiel la nura laborlingvo en ĉiuj internaciaj rilatoj. Jam nun ankaŭ en EU evoluas la duaranga elito en neanglaj landoj, kiu malkontentas, ĉar ĝi ne povas avanci en siaj karieroj ekster sia nacia kadro kaj evoluigas la naciismojn: Ni ja ne volas tian Eŭropon! Tiuj naciismoj nun elstaras klare en Belgio, sed kaze de ekonomia krizo en EU ili rapide fortiĝos en tuta Eŭropo kaj kontribuos al rapida disfalo.

EU devas baldaŭ pristudi lingvan politikon kaj serĉi solvon, kiu ebligos efikan komunikadon kaj samtempe egaligos la lingvajn ŝancojn por ĉiuj (trovi komunan lingvon, kiun ĉiuj egale devos lerni kaj kiu ne produktos en unuopulo senton de malegaleco kaj subordeco).

Zlatko Tišljarić

### Vortoj de Giorgio Silfer

En la medio kiun mi vizitadas ne situas UKoj kaj COoj, sed ekzemple la aŭtonomaj kulturcentroj. En unu el ili, „La Kvinpetalo“, mi havis la ŝancon renkonti simpatian sinjorinon. Ŝia nomo estas Marie-France Conde-Rey. Eklerninte antaŭ du jaroj Esperanton, ŝi bele posedas nian lingvon, kvankam ŝi preferis partopreni ankoraŭ progresigan kurson, gvidatan de mia edzino. Dum paŭzo ŝi trafolumis, unufoje en sia vivo, iun numeron de LF (*Literatura Foiro*), kiu hazarde enhavis kulturpolitikan raporton pri la jaro 1993. Leginte la raporton ŝi faris jenan komenton:

„Ekzistas en esperanto tri partioj. Mi ne scias kiom grandaj ili estas respektive, ĉar mi ne konas detalojn pri la kvantoj. Sed ili estas certe tri. Mi nomus ilin, laŭ la tendencoj: **finvenkismo**, **raŭmismo**, **sektismo**. La finvenkistoj volas enkonduki esperanton kiel internacian helplingvon. La raŭmistoj vivas Esperanton kiel transnacion kulturlingvon. La sektistoj (kaj mi suspektas ke ili estas la plej granda partio) volas simple resti inter si, kun la propra klubo, la propra klaĉokafo, la propra ludilo kaj la propraj kvereloj.“

Aŭskultante ŝin, mi opinias ke s-ino Conde-Rey komprenis pri esperanto dum du jaroj multon pli ol eĉ (eks)estraranoj dum dudek.

Literatura Foiro, dumonata kultura revuo en Esperanto.  
organo de esperanta PEN-centro  
kun aŭspicio de svisa esperanto-societo  
jaro 26, februaro 1995, n-ro 153.

### Vortoj de Dr. Pavel Lehký

Mi lernas la anglan lingvon pli ol 50 jarojn, 40 jarojn la francan, 30 la germanan krom intertempe ankaŭ aliajn lingvojn...

En la angla lingvo mi skribas ĉiutage pli ol en mia ĉeĥa – gepatra – kaj ankaŭ plie mi legas en angla ol en la ĉeĥa. Temas ĉefe pri faka materialo, por alio mankas tempo.

Vere kaj modeste mi povas diri, ke la anglan lingvon mi ankoraŭ plene ne regas kaj same pri la aliaj lingvoj kaj simile mi povas diri eĉ pri la ĉeĥa post 30 jaroj en Svislando...pri gepatra lingvo de altlernejano!

Tio pri kio oni diras „rego de la angla“ estas miso, grandega. Oni nepovas paroli al mi pri nivelo de reĝo de la angla lingvo de abituriento de mezlernejo. Tion mi propre travivis kaj samtempo pri tio atestas. Ke oni povu prilabori eĉ dudek patentojn dum kelkaj horoj vespere, oni devis dediĉi por lerni nekredablajn milojn da horoj, kiun ne ĉiu estas volonta oferi. Mi certe tion ne farus, sed por mi tio estis batalo por transvivo en emigracio.

La angla lingvo estas tre malfacila lingvo kaj ĝi neniam estiĝos vere la monda lingvo.

Kial tiuj ekslernantoj de la angla lingvo komunikas inter si pli facile ol kun vera anglo? Ĉar ili interparolas malĝuste. La angla lingvo posedas dudek vokalojn kaj ĉeĥoj kun siaj kvin nur malfacile povas konsideri tion. (Tial mi opinias malprudente klopodon de fraŭlino instruistino, kiu neestante anglino, instruas al infanoj en antaŭlerneja aĝo la lingvon, instruante eraran elparolon, kiun infanoj jam neniam forlasos. Kiam tiu fraŭlino estus anglino, estus grava stulto malŝpari ŝian kapablon al infanoj en aĝo antaŭlerneja, anstataŭ uzi ŝiajn kapablojn por instruado de mezlernejanoj kaj studentoj de universitatoj ktp.) La malsaĝecon de nia socio mi konsideras por mi malfacile eltenebla.

Dr. Pavel Lehký entreprenas en Ĉeĥio kaj Svisio, negoce ligas kontaktojn kun granda parto de mondo. Esperanton li trovis antaŭ nelonga tempo. Li pripensis racian solvon de lingva problemo inter popoloj kaj resumis, ke naciaj lingvoj ne estas irebla vojo. Kaj kiel aktiva kaj celtena homo mi difinis paŝojn kiel akiri subtenon por neŭtrala, artefarite kreita lingvo.

Januaro 2008

### **Alfred Nobel - nobelulo inter la sciencistoj kaj lingvistoj**

Ĵurnalistoj nomis Alfred Nobel „la vendisto de la morto“, „la viro, kiu faris la militon profitdona“. Kaj tiu Alfred Nobel estis ĉe la bazo de la ĉiujare atribuita pacpremito... Iom malfacile komprenebla? Aŭ jes aŭ ne...

Alfred Nobel naskiĝis en 1833 en Stokholmo kiel la tria filo de Immanuel Nobel. Kiam li havis naŭ jarojn, li transloĝiĝis kun sia patrino kaj du fratoj (Robert kaj Ludvig) al Sankt-Peterburgo por ricevi privatan instruadon. Tie plia frato Emil naskiĝis. Alfred studis hejme, ĝis dek ses jarojn. Li ne nur estis klera pri kemio, sed li estis ankaŭ pasia leganto kaj parolis flue la anglan, germanan, francan, svedan kaj rusan.

Lia patro Immanuel estis arkitekto kaj entreprenisto. Li fondis entreprenon, kiu fabrikis, inter aliaj varoj, torpedojn. La entrepreno kreskis prospere, interalie pro multaj mendoj de la rusa armeo. En 1859 la entreprenon transprenis la dua filo Ludvig.

La kreo de lia imperio

Dum du jaroj Alfred vojaĝis diversdirekte, interalie al Francio (kie li laboris en laboratorio) kaj al Usono. Post sia reveno li laboris en la firmao de sia patro. En 1859 la entrepreno bankrotis, sed Alfred daŭrigis siajn eksperimentojn kun eksplodaĵoj. Li precipe serĉis metodojn por pli sekura fabrikado kaj pristudis la uzon de nitroglicerino. En la jaro 1864, kiam li havis 31 jarojn, li ricevis la unuan patenton pri sia eksplodaĵo. La industriistoj nomis ĝin la plej granda malkovro iam ajn farita pri la principoj kaj praktikoj de eksplodaĵoj. Malfeliĉe okazis en la sama jaro ankaŭ granda katastrofo. Lia fabriko eksplodis, kaj kvin homoj mortis. Inter ili lia 20-jara frato Emil. Nun ankaŭ bankroto de lia firmao minacis.

La urbo ne volis doni al li novan permeson, kaj pro tio li daŭrigis sian laboron en ŝipokorpo sur Mär-la-lago. Kiam reprezentanto de la ŝtata fervojoj rakontis al li, ke liaj eksplodaĵoj estos uzataj por la konstruado de tuneloj, Alfred sciis, ke lia entrepreno estas savita. Post sia unua patento li kolektis pli ol 300 patentojn plejparte rilate dinamiton kaj la sendanĝeran uzon de ĝi. Aperis eksplodigiloj, kiuj ekbrulas ne de frotado aŭ premado, sed nur de sparkado. Vojkonstruistoj kaj fervojaj kompanioj estis entuziasmaj uzantoj. Ankaŭ en la minekspluatado dinamito pruvis sian grandan utilon, kaj finfine la milita industrio ne povas vivi sen tia materialo.

La „rusaj Rockefeller“

La fratoj de Alfred, Ludvig kaj Robert, restis en Rusio. Ili komencis komerci per petrolo kaj ekspluatis kiel unuaj petrolkampojn de la Baku-regiono en la sudo de Rusio. Ankaŭ Alfred investis

parton de sia mono en tiun komercon. La sukceso estis preskaŭ senlima. En la komerco de la sepdekaj jaroj de la 19-a jarcento ili produktis la unuajn barelojn. Post dek jaroj ilia merkato parto estis tiel granda, ke la usonaj petrokompagnioj ĉesigis sian eksporton al Rusio. La fratoj Nobel estis konataj kiel „rusaj Rockefeller“.

#### Filozofa verkisto kaj pacemulo

Alfred Nobel forte interesiĝis pri literaturo. Kiam li havis 17 jarojn, lia patro proponis al li studvojaĝon al Usono. Ekzistis tamen kondiĉo: li rajtas foriri nur se li promesas rezigni pri siaj planoj iĝi verkisto. Tion li faris, sed lia emo al la skribkulturo restis. *Nemezo*, tragedio en kvar aktoj, estis presita ĵus antaŭ lia morto. Tamen ĉiuj ekzempleroj escepte de tri estis detruitaj tuj post lia morto pro tio, ke la verko estis konsiderata blasfema kaj noca. La unua reala eldono aperis nur en 2003 en Svedio en la sveda lingvo kaj en Esperanto (kaj poste en la slovena, tradukita el Esperanto).

Li estis pasia leganto de fikcio kaj havis intereson pri filozofio. Li legis filozofiajn verkojn kun granda atento, substrekis frazojn kaj faris notojn en la margenoj. Kvankam tiuj notoj certe ne ĉiam atestas pri originalaj ideoj, ili donas bonan imagon pri lia maniero de pensado. Li komentis ne nur la tekstojn de Platono, Aristotelo kaj Demokrito, sed ankaŭ Voltaire kaj Darwin. Li notis ekzemple, ke estas malklare, kiamaniere homoj akiras koncepton de Dio. Aristotelo opiniis, ke la kialo estas timo, Voltaire asertis, ke ĝi estas deziro de la intelektularo erarigi simplajn homojn. Nobel parolis respektive pri la filozofiaj duboj de Descartes kaj Spinoza, aldirante, ke dubo devas esti la origino de la filozofia pensado.

Teorioj pri kono kaj konakiro vekis lian specialan intereson. Tiamaniere li venis aŭtomate al la tezo de Locke: „ĉiu kono venas de observado“ aldonante, ke niaj cerboj estas nefidinda konservejo de niaj observadoj. Tio gvidis lin plue pensi pri la metodo de la scienca pensado. Li notis, ke ĉiu scienca pensado estas bazita sur la observado de similaĵoj kaj diferencoj. Li daŭrigis: „Kemia analizo estas kompreneble nenio alia ol tio, kaj eĉ matematiko ne havas alian fundamenton“.

Historio estas bildo de pasinteco kun similaĵoj kaj diferencoj, geografio montras la diferencojn en la terosurfaco, astronomio estas la studo de similaĵoj kaj diferencoj de astroj, fiziko estas la studo de altira forto kaj movo de objektoj. La sola diferenco estas religio, sed eĉ ĝi baziĝas sur simila naiveco aŭ troa kredemo de homoj. Ankaŭ metafiziko devas trovi sian originon en tia hipotezo de analogioj. Sen troigo, li asertis, ke la observado kaj la esplorado estas la bazo de nia kono. Oni povas kompletigi tion kun la vortoj de Humboldt: „Oni iras de observado al eksperimento sur bazo de analogioj kaj konataj leĝoj.“ Alfred Nobel estis konvinkita, ke li uzis tian metodon dum sia eksperimenta laboro.

#### Kompatinda kreitaĵo

Nobel estis tre humila. Kiam lia frato volis skribi historion pri la familio Nobel kaj petis, ke li verku aŭtobiografion, li respondis: „Alfred Nobel kompatinda kreitaĵo, prefere estus mortigita de humana kuracisto, antaŭ sia alveno al tiu ĉi mondo. Liaj plej gravaj virtoj: li purigis regule siajn ungojn kaj ĝenis neniun. Liaj plej grandaj malfortecoj: li posedis nek edzinon aŭ infanojn, nek gajhumoran karakteron, nek sanan avidon.“

Oni rakontis, ke Alfred Nobel akiris ideon krei premiojn por meritplenaj homoj aŭ institucioj, kiam li hazarde legis sian propran nekrologon en diversaj ĵurnaloj. Ĵurnalista intermiksita lin kun frato Ludvig, kaj la informo estis transprenita senŝanĝe en aliaj gazetoj. En la komunikoj li estis priskribita kiel „la viro, kiu faris la militon profitdona“.

Tamen, eble pro sia intereso pri filozofio, li montris sin dum sia tuta vivo konvinkita pacemulo. Li diskutis ofte pri tio kun Bertha von Suttner. Iam li diris al ŝi: „Eble miaj fabrikoj haltigos militojn pli frue ol viaj kongresoj. Kiam du armeoj povas detrui la alian en unu sekundo, ĉiuj civilizitaj nacioj time retiriĝos kaj resendos siajn soldatojn hejmen.“

#### Ĉu li sukcesis en siaj celoj?

Alfred Nobel neniam havis la iluzion, ke komitato de kvin norvegoj, kiu ĉiujare disdonas la Nobelpremion, vere fondus eternan pacon. La unuajn jarojn la premioj estis atribuataj al universale

rekonataj personoj. Poste ekestis pli da polemiko. Ĝuste tiu polemiko estis parto de la sukceso. Tiel en 1938 Adolf Hitler estis nomunita, sed tamen ne gajnis la premion. Henry Kissinger – gajninto de Nobelpremio en 1973 – respondecis pri la bombardadoj en Kamboĝo en 1969 kaj 1970, dum kiuj proksimume 800 000 civiluloj pereis. En 1994 gajnis Jasir Arafat, kiu poste estis akuzita pri terorismo. Ankaŭ pri Begin, iama ĉefministro de Israelo, oni povas dubi. Kion pensi pri Wangari Maathai, kiu ricevis la premion en 2004. Ŝi ne estis vere elektita demokrate fare de la kenja parlamento kun 98% de la voĉoj. Rimarkinda detalo estis ŝia deklaro: „La aidosa viruso estas armilo, kiun blankaj sciencistoj inventis por eksterni la nigran rason.“ Tiu ĉi deklaro provokis ege indignajn reagojn kaj damaĝis ŝian reputacion.

Oni povas diri, ke la Nobelpremio precipe estas politika elekto kaj ĝi diras pli pri la elektantoj ol la elektatoj. Klare la spirito de la epoko ludas gravan rolon. Aliflanke oni ne tro relativigu la valoron de la premio. La grupo *Kuracistoj por la evitado de nuklea milito* gajnis la premion 1985 kaj Joseph Rotblat kun Pugwash en 1995. Tio donis al la du movadoj multe da bonvolo por disvastigi iliajn celojn. La Nobelpremio povas esti mikrofono kun monda atingopovo, kiel en 1996, kiam Ramos Horta kaj la roma katolika episkopo Carlos Belo finfine per la pacoceremonio altiris la atenton de la mondo al problemoj en sia regiono. La premio ankaŭ povas doni iom da protektado, kiel en 1935 por germana ĵurnalisto kaj pacemulo Carl von Ossietzky. La nazi-reĝimo en Germanio malpermesis al Ossietzky, kiu restis tri jarojn en koncentrejo, iri al Oslo por ricevi la premion. Tamen post la aljuĝo oni alkondukis lin al hospitalo, kie li post du jaroj mortis pro tuberkulozo.

Sendube la premio restas grava simbolo en la homa strebado al paco.

Edward Kusters

MONATO 27-a jarkolekto – decembro 2006/12.

## Vortoj de Karel Čapek

Karel Čapek estas vere elstara ĉeĥa homo, verkisto kaj ĵurnalisto de la „unua respubliko“ de Ĉeĥoslovakio. Li mortis subite en plena laboro, kiam en la respublikon venis teruraj tempoj de okupado fare de faŝistoj 1938.

„La parolo estas ununura aŭtentika esprimo de animo de la nacio. Religiojn, kutimojn, nacidevon kaj ĉiujn kondiĉojn oni povas ŝanĝi per revolucio; nur en parolo, en lingvo ne okazas revolucio, tie estas eterna kontinuo, eterna akceptado, silenta kaj profunda evoluo same, kiel funkcias la naturo. La parolo estas en interligeco; oni ne povas ĝin transformi, oni ne povas ĝin artefarite influi; oni povas ĝin ekstermi, sed ĝi povas mem renversiĝi; ĝi havas obstinan econ de naturaj aferoj. Miljara estinteco traflugas ĉiun vorton; ni faras ion grandefekte malnovan, historian, kiam ni parolas ĉeĥe. Sed tamen, ĉiu de ni devis eltrovi ĉiun vorton; gepatra lingvo estas lingvo de nia infaneco, la unua parolo de animo, trezoro de unuaj aventuroj, trovoj kaj ekkonoj; ni eterne rilatas al sia infaneco, kiam ni parolas patrinan lingvon.“

„La parolo estas animo kaj kulturo de la nacio. La sonoj de la parolo kaj melodio konfesas pri poeziaj ĝojoj de la tribo; ĝia strukturo kaj pureco enhavas misterajn leĝojn de pensado; ĝia logikeco difinas mezuron de raciaj donacoj de nacio. Tie, kie la parolo knaras, skrapas, skrapas kaj knaras io en profundeco de ekzisto de la popolo; ĉiu trivialo kaj vanteco en parolo, ĉiu vaka frazo

estas simptomo de io difektita en socia vivo.“

### **Vortoj de Zlatko Tišljár**

Mi konsentas, ke ĉiu rajtas decidi mem pri sia nomo kaj oficiala membreco (aparteno), sed tiu decido ne influas la veron. Mi renkontis multajn Romaojn kiuj oficiale negas ke ili estas Romaoj ĉar tio povus damaĝi ilin. Ili pravas, ili rajtas negi por utili al si. Sed tio ne ŝanĝas la veron, ke ili estas Romaoj. Se iu ne volas akcepti esti esperantisto (aŭ kiel mi dirus E-popolano), tion li kompreneble rajtas. Sed se li pledas por Esperanto ĉe neesperantistoj, tiu lia negado neniel ŝanĝos la fakton ke aliaj konsideros lin esperantisto kune kun siaj antaŭjuĝoj pri Esperanto kaj esperantismo. Mi persone preferas ne mensogi al mi mem kaj akceptas, ke mi estas "E-popolano" kun ĉiuj bonaj kaj malbonaj aspektoj de tio (ke fojfoje mi efikas kiel utopiisto pri utopio kiun aliaj ne kredas). Se mi renkontas homojn, kiuj estas tute fermitaj por tiu mia aparteno, mi simple interrompas la kontakton. Mi neniun konvinkadas pri kvalitoj de Esperanto se tiu klare montras, ke li malakceptas la aferon. Mi scias, ke mi ne povas konvinki lin kaj mi foriras. Ne gravas kion li opinios pri mi. Temas pri la apartensento al aliaj valoroj. Homo kiu estas konvinkita, ke la mondo estas bona tia kia ĝi estas, do ke regas ĝin lingve la angla (ĉar ja la historio montris, ke ĉiam regis lingvoj de la plej potencaj elitoj) simple sentas homojn kiuj tion ne akceptas kiel malamikoj de ilia mondokoncepto.

Temas pri la sama psikologia rilato kiel diverseco de religiaj konceptoj. Se mi estus konvinkita katoliko, mi neniel povus konvinki islamanon, ke li malpravas. Kvankam ŝajnas, ke ĉe lingva demando ne temas pri la samo, ke ĉi tie ni havas objektivajn argumentojn, tamen ne estas tiel. La homan rilaton ankaŭ al tio difinas liaj konceptoj pri la valoro de io. Homo kies vivkoncepto enhavas la internacian lingvan staton en kiu regas la angla kiel ion bonan, neniel kapablas akcepti argumentadon, kiu renversus tiun lian vivkoncepton.

Amike,  
Zlatko Tišljár, 2007

### **Vortoj de Ludoviko Molnár**

Mi entuziasme volis lerni la anglan lingvon dum la pasintaj 55 jaroj.

Mi povis sen vortaro traduki 'ĉiujn medicinajn tekstojn el la angla en la hungaran. Mi komprenas la anglalingvajn, medicinajn prelegojn, precipe, se iliaj tekstoj estas samtempe projekciataj.

Sed mi ne sukcesis alproprigi tiun ĉi lingvon tiel, ke mi povu senĝene diri ĉion angle, kion mi volas diri...

Mi ne komprenas la anglalingvajn kantojn, kiuj estas disaŭdigataj en la "Hungara Radio" de mateno ĝis vespero...

Mi ne komprenas la rapidan, usonan kaj aŭstralian paroladon...

Mi restas do ĝis la fino de mia vivo "duaklasa lingvouzanto" de la anglalingvo...

Mi konsolas min nur per la penso, ke eble ne nur mi sola estas tiel stulta en la vasta mondo...

Multsalute  
Ludoviko

## Verkisto fremda

Jan Stanisław Skorupski

Repondante al kelkaj, mi skribis jenan frazon: „Mi opinias, ke tiu ĉi lingvo ĉesis interesigi homojn, ĉar ĝi fariĝis lingva sekto, okupata nur pri siaj internaj aferoj, kaj iluzi neŭtralecon de tiu ĉi movado forprenis de esperantistoj sociajn celojn – la nutraĵon de ĉiutageco.“

Homo, kiu eniras esperantan kurson, devas esti kuraĝa por elteni fremdecon. Poste alkiutimiĝas kaj pritraktas aliajn same, kiel li estis antaŭe pritraktata. Tiu ĉi fenomeno nomiĝas NE KROKODILU. Ekzemplo kun mia edzino Barbara: ŝi estis iam instruistino pri la franca kaj itala, nun ŝi faris diplomon pri la angla kaj instruas angle. Hejme ni parolas germane. Mi montras tiun poliglotecon de mia edzino speciale por ilustrati la eblecon paroli kun preskaŭ ĉiuj kaj same profundigi fremdecon, kun ŝi travivis iam dum unu feria tempo. En unu grupo de esperantistoj ŝi estis tute fremda, traktata malamike, neniu volis paroli kun ŝi alilingve, ĝuste pro tiu alvoko NE KROKODILU, (ŝi estas en diversaj socioj tre ŝatata). Rigardu aliajn sektojn – ili agadas same.

Nun mia propra ekzemplo: mi estas certe sola pola (pollingva) verkisto, kiu eklernis la lingvon Esperanto kaj skribis en tiu ĉi lingvo tre multe, eĉ verŝajne tro multe (pri tio atestas la Guinness-rekordo), sed mi estas en Esperanto tute fremda, ĉar mi ne estas membro de iu ajn grupo, mi ne kantas kanzonoj pri Esperanto, mi ne skribas pri Esperanto, mi ne estas esperantisto, ĉar mi okupiĝas pri aliaj ol minimumaj Esperanto-temoj. Nun mi komprenas bone aliajn nacilingvajjn verkistojn, kial ili ne emas skribi esperante – ili ne volas esti fremdaj.

Nacilingvaj verkistoj (ne nur polaj) pritraktas min kiel strangulon, kiu skribas por neniuj, kaj ili verŝajne pravas. En la teatroj, en kiuj mi koncertis esperante, la publiko aplaudis fervore kaj mi supozis, ke estas esperantistoj, do mi demandis: „Kiu parolas esperante?“ Respondis neniuj.

Mian literaturan interretan paĝon vizitis milionoj da polilingvanoj kaj germanlingvanoj, sed nur malmultaj esperantistoj. Pro mia esperanteco mi ne bedaŭras, mi restas esperantanto sen espero kaj tio ĉi verŝajne estas unu de tiuj paradoksoj, kiuj estas nepraj por ĝui la vivon.

Zuriko, la 14-an de septembro 2007

[jss@skorupski.com](mailto:jss@skorupski.com)  
[www.skorupski.com](http://www.skorupski.com)

## La Esperanta Kulturo

La unua kaj precipa tasko de Esperanto estas funkcii kiel (relative) facila kaj neŭtrala kaj fidebla interkomunikilo inter homoj elnaskiĝe parolantaj malsamajn lingvojn. En nia entuziasmo por la lingvo kaj por ĝiaj adeptoj ni neniam forgesu tiun gravan precipan taskon, la ekzistoraĵon de Esperanto.

Tiu precipeco signifas, ke ĉiu alia uzo de nia lingvo estas nur flankajo, kiom ajn interesa kaj valora. Tiuj flankajoj estas bonŝancaj „kromproduktoj“. Se persono studas kaj uzas Esperanton nur por tiuj flankajoj kaj ne por la precipa tasko, ni nomas lin/ŝin esperantoparolanto, ne esperantisto.

Formante Esperanton, Zamenhof zorgis (jen konscie, jen ne), ke la lingvo uzeblu ankaŭ por la flankokupoj. Tio vidiĝis speciále en beletro. Kaj kvankam poezio pli facile kreata en multaj aliaj lingvoj, la esperanta poezio povas belegi, sed nur bezonas iom pli grandan talenton ol por krei etnan poezion. Tamen ni ne forgesu, ke beletro ne estas la celo precipa de Esperanto.

Alia flankokupo estas uzi Esperanton por klarigi, kaj eterne pridiskuti, gramatikajn kaj semantikajn lingvajn fenomenojn, pere de Esperanto en kiu lingvo tiuj fenomenoj devas ofte vidi plej klare. Sed same kiel beletro tiu flankajo ne estas la precipa tasko, kvankam helpa al la ĝusta kaj fidebla uzo por tiu precipa tasko, la rekta interkomunikado inter la tutmonda homaro.

Tria flankafero estas uzi Esperanton por sia enfamilia vivo, do kiel unuan lingvon, ofte el-



naskiĝe. Nek ĝi estis aŭ estu ĉefcelo, ĉar ĝi tiam, se ĝenerale akceptita, detruus la etnajn lingvojn.

Alia flankaĵo estas la kreado aŭ kreiĝo de speciala esperanta kulturo. ankaŭ ĉi tie temas ne pri esperantismo, sed simple pri esperanto-uzado. Kompreneble, multaj kiuj uzas Esperanton pro unu el la flankokupoj, estas krome veraj esperantistoj, homoj kiuj studas, uzas, instruas kaj propagandas la lingvon por ĝia precipa celo, simple esti fidebla interkomunikilo interpopola.

Se oni deziras krei kaj praktiki specialan Esperanto-kulturon, ĝi povas formiĝi duspece: aŭ ĝi estos miksaĵo de diversaj mondaj kulturoj, kvazaŭ infuzaĵo el la veraj kultureroj, aŭ ĝi estos kombinaĵo de kutimoj kreskiĝintaj en internaciaj kunvenoj esperantistaj kaj de tipe esperantaj lingvouzaĵoj. En la unua kazo ni imitas la nun ĝeneralan tendencon ekonomie, kaj por tio socie, uniformigi la popolajn interesojn (kaj aĉetmanierojn) al t.n. sennacieca globismo („globalizado“). Se esperanto-parolanto, aŭ eĉ esperantisto, deziras preni parton en tiu flankokupo, nu, ili (li aŭ ŝi) faru tion. En la dua kazo la rezulto estos trogravigo de nekulturecaj manioj interesaj nur por interligi esperantistojn pere de supraĵaj kaj tute sektismaj uzaĵoj (i.a. la uzo de nenecesaj sentimentalaj vortoj kiaj „etoso“ kaj „korifeo“). Bedaŭrinde temas precipe pri ĉi tiaj senvaloraĵoj, se oni parolas pri Esperanto-kulturo. Anstataŭ propagandi Esperanton, oni tiel kreas du kampojn: la „bonaj“ esperantistoj kun sia propra „kulturo“ kaj la „malbona“ resto havanta alian kulturon.

En nia propagando por Esperanto ni ĉiam substreku la precipan taskon, la (relativan) facilecon kaj neŭtralecon kaj fideblecon. Ne malutilas menciadi ankaŭ kelkajn flankajn celojn, kiel ĝian helpon lerni sian kaj aliajn lingvojn, ĝian beletrumpovon, ĝian helpon en la scienca lingvismo, ĝian helpon krei pacajn ideojn kaj praktikon, ĝian malmultekostan helpon en komerco, ĝian helpon scii pri aliaj kulturoj. Nur oni bezonas zorgi, ke oni prezentu la fideblan (Fundament'ecan) Esperanton, ne la erarplenan kaj fremdvortplenan specon de Esperanto uzatan nun grandskale. Montri ĉilaston ridegigus la ne-esperantistajn specialistoj kaj tuj forpelus ilin al serĉado de pli serioza alternativo.

Mia fina averto temas pri la „esperanta kulturo“. Ĉar ĝi estas senvalora, eĉ kelkaspekte malamika, por la ne-Esperantista mondo, ni neniam menciui ĝin, almenaŭ ne kiel seriozaĵon, ĉar ĝia propagando estos negativa. Tio validas same por la miksaĵkulturo, kiu, ĝuste, kolerigus multajn etnoamantajn homojn, kiel por la manieraĵoj Esperantulaj laŭdataj en kelkaj rondoj niaj kiel „Esperanta kulturo“. La ekstera mondo nur mokus nin pri niaj valtdisniaĵoj.

Dum montrado ante nian lingvisman diletantismon ridigus nur la ne-Esperantistajn lingvistojn, ekspoziciado ante nian t.n. kulturon ridigus ne-Esperantistojn ĉiujn. Ni ne donu al ili la ŝancon ĝuste kaj danĝere moki nin kaj nian lingvon.

Marcel Leereveld

LAŬTE! dumonata liberesprimilo por progresemluloj

FR-47470 Beauville

Nr. 187, januaro, februaro 2007 p.63.

1. Homo estas socia estaĵo (socio estas minimume 2 personoj, se ili evoluigas reciprokan konfidon kaj komunan kredon)
2. Homo kontentigas sian sociemon en multaj socioj samtempe (grupoj), kiel familioj, amikaj rondo, societoj, lokaj komunumoj, vilaĝo aŭ urbo, regiono, popolo, religio ktp.  
Ĉiu el la grupoj evoluigas socian (grupan) identecon (komunajn celojn, elementojn de samtipa konduto, komunajn ceremoniojn, folklorajojn kaj kulturon, elektas sian gvidantaron...)
3. Unuopulo en sia vivo aliĝas al novaj kaj forlasas malnovajn grupojn (familion, en kiu oni naskiĝis, oni forlasas kaj fondas la propran aŭ plurajn proprajn, el unu urbo oni translokiĝas al alia kaj oni ŝanĝas sian lokan apartenon, aŭ eĉ la religion aŭ patrujon – foje pro translokiĝo, foje pro tio, ke oni forprenas ĝin de ni (ekzemple post militoj...))
4. Identecojn de forlasitaj grupoj oni ne perdas (post fondo de la propra familio oni ne ĉesas esti membro en sia naskiĝfamilio, post forlaso de la patrujo kaj iompostioma akcepto de la nova oni ne forgesas la malnovan...) kvankam la grado de la aparteno iome malfortiĝas.
5. El tio sekvas, ke estas normale al la jam ekzistantaj identecoj aldoni novajn kia ekzemple estas la eŭropa identeco. Kun la alprenado de nova identeco oni ne forviŝas la malnovajn (ekz. popolan, regionan, religion ktp)
6. La ĉefa signo de identeco estas lingvo (se ni akceptas, ke ĉiu varianto de lingvo aŭ dialekto estas aparta lingva sistemo). Ekz. publikloke ni parolas la lernitan nacian lingvon, en nia vilaĝo ni parolas regionan aŭ lokan dialekton, en strata bando ni parolas bandan slangon, en familio ni parolas familian varianton de la loka dialekto, kun etaj infanoj ni parolas varianton de infana lingvo, kun handikapita infano ni parolas adaptitan lingvon, kiun ĝi kapablas kompreni ktp)
7. Lingvo havas du samgravajn bazajn funkciojn: la komunikan kaj la identecan. Kiam tiuj du funkcioj konfliktas inter si, pli gravas la identeca funkcio (ofte ni intence parolas nian minoritatan lingvon, kvankam ni scias, ke oni ne komprenas nin, ĉar tiam la celo ne estas komuniki sed montri nian apartenon)
8. Nova identeco nepre necesigas la ekziston de nova identeca lingvo, kiu estas diferenca de ĉiuj aliaj, ĉar ĝi devas esti neŭtrala. Tiu lingvo signas la novan apartenon (eŭropan). Tiu lingvon devas akcepti apartenantoj de la nova komunumo emocie (ne nur racie) kiel sian, ili devas havi emocian rilaton al ĝi. Kaj tio estas ebla nur, se por ĉiuj apartenantoj de la nova komunumo ĝi estas la sama, sed diferenca de ĉiuj aliaj komunumoj. Koncerne la eŭropan lingvon, la angla ne povas fariĝi identeca lingvo, kvankam ĝi jam servas kiel komunika lingvo kaj ĝi ne povas kontribui al la evoluigo de eŭropa identeco, ĉar la eŭropa identecolingvo devas esti neŭtrala rilate al ĉiuj membroj (la angloj kaj irlandanoj ne rajtas esti privilegiitaj) kaj ĝi devas nepre diferenciiĝi de identecolingvo de USONO, ke eŭropanoj estu fieraj pri siaj valoroj, kaj ke sian fieron rilate la apartenon ili montru parolante sian kaj ne amerikan lingvon. Komprenoble, ke la identeca lingvo transprenos ankaŭ la rolon de la komunika.
9. Neŭtralan lingvon oni povas akiri je tri manieroj:
  - a) elektante nacian lingvon, kiu apartenas al neniuj el la popoloj, kiuj aliĝas al la nova komunaĵo, ekz. la araban. Tian solvon oni elektis en ekskoloniaj landoj, kiel la angla en Bharato (Hindujo) aŭ Niĝerio, la franca en iuj afrikaj landoj ktp.
  - b) elektante iun el la mortaj lingvoj, kiujn oni povas revivigi, sur kies bazo elkreskis historie eŭropa kulturo, kiaj estas la latina aŭ la malnovgreka. Tian solvon elektis israelanoj, kiam la mortan hebrean ili renovigis kaj »revivigis«.
  - c) Elektante iun el la novlatinidaj lingvoj, kiujn iniciatis lingvistoj aŭ iuj movadoj kiel Esperanto, (kiu evoluigis dum sia pli ol 120-jara historio apartan kulturon kaj lingvan trezoron). Tian solvon oni elektis en Indonezio kaj en kelkaj aliaj polineziaj landoj (Bahasa indonesia estas lingvo, kiun baze de malaja lingvo ellaboris lingvistoj reguligante plane la gramatikon meze de 1950-aj jaroj kaj tiun lingvon nun uzas pli ol 200 milionoj da homoj).  
Sovetunio kaj Jugoslavio ne konsciis pri la identeca rolo de lingvo, kaj ili klopodis evoluigi

sovetan respektive jugoslavan identecon uzante la lingvon de la plej granda popolo, kiu ja servis kiel komunika lingvo, sed ne povis esti akceptita kiel lingvo de komuna identeco, ĉar ĝi ne estis neŭtrala. Tial ili ne sukcesis evoluigi komunan novan identecon. En kriza tempo tio estis sortoporta kaj esence influis al la disfalo de tiuj plurpopoloaj ŝtatoj.

Sen solvo de tiu problemo Eŭropa Unio disfalos okaze de la unua pli grandskala ekonomia aŭ politika krizo.

Asocio por Eŭropa Konscio Maribor  
Besednjakova 1 tel. 02-4200669  
E-mail: zlatko.tisljar @ siol.net  
www.europo.eu/aek

## **Unueco en lingva diverseco = Esperanto**

### **Artikolo 26-2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj:**

„La edukado celas al la plena disvolviĝo de la homa personeco kaj la fortigo de la respekto al la homar rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi faciligu la komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj kaj ĉiuj etniaj aŭ religiaj grupoj; kaj spotu la disvolviĝon de la agadoj de Unuiĝintaj Nacioj por subteno de la paco.“

Nu, kia edukado, kia kompreno kaj amikeco povas ekzisti, se oni ne komprenas la lingvon de la aliuloj? Sen lingva kompreno, tiaj universalaj celoj restas vane neatingeblaj.

Nur unu lingvo - Esperanto - estas taŭga kaj neŭtrala,  
lingva ponto universala.

## **Vortoj de Claude Piron**

Ekzistas, resume, tri sistemoj de internacia komunikado. Unu burokrata, unu faŝisma, unu demokratia.

La burokrata sistemo estas tiu de internaciaj organizaĵoj, kiel UN aŭ Eŭropa Unuiĝo. Kiel ĉiuj burokrataj sistemoj, ĝi uzas gigantajn kvantojn da papero, tempo, mono elektro, homa energio,

por mizeraj rezultoj. Kaj ĉion ĉi pagas la impostpagantoj. Per ĉiu vorto tradukata en Eŭropa Unuiĝo eblus savi la vivon de tri infanoj, kiuj mortas ie en la mondo pro diarea malsano. La kuracado ja kostas nur 12 usonaj cendoj por ĉiu infano, dum la tradukado kostas en brusela burokratejo 36 cendojn por ĉiu vorto. Se mi aldonos, ke tiu burokratejo tradukas 3,6 milionojn da vortoj ĉiutage, vi tuj komprenos, kiel socie neakceptebla estas tiu sistemo de komunikado, la burokrata.

La faŝista sistemo estas tiu, en kiu unu lingvo, kaj sekve unu kulturo, unu nacio, aŭ grupo de nacioj, ricevas monopolan pozicion, ne pro la enaj kvalitoj de la koncerna lingvo aŭ kulturo, nur por la fortirilato inter la ŝtatoj, kelkfoje nur por prestiĝo rezultanta el serio da historiaj hazardoj, alivorte sole pro politikaj, ekonomiaj kaj similspecaj faktoroj, kiuj neniel rilatas al la postuloj de lingva komunikado kontentiga por ĉiuj. Tiun sistemon oni povas nomi ankaŭ la ĝangala, ĉar, senkonsidere pri iu ajn homa justeco aŭ eĉ pri la postuloj de la praktika vivo kaj de saĝa ekonomia agmaniero, la plej forta grupo kaptas la povon, diktas la normojn, kaj devigas ĉiujn aliajn obei, adapti sin, sklave sekvi eĉ plej absurdajn detalojn en la maniero vortigi la pensojn. Tia estis la sistemo komuni per la franca en la deknaŭa jarcento, tia estas la internacia uzo de la angla en la nuntempo. Tiu sistemo, kiu privilegias la anojn de difinitaj sociaj tavoloj, havas multajn fiajn efikojn, kiuj ni ne povas listigi nun, sed kiuj kreas en la mondo danĝerajn fuŝ-ekvilibrojn, se diri nenion pri la katastrofaj kulturaj konsekvencoj de tia lingva sintrudemo. Singapuro estas pri tio malĝojiga ekzemplo: kiom da ĉinoj, da malajoj, da tamiloj tie perdas sian kulturon, ĉar la familioj alprenas la anglan kiel hejman lingvon pro la espero, tre ofte iluzia, ke ili tiel grandigos la ŝancojn de bona ekonomia estonteco por siaj gefiloj!

Kaj al la burokrata sistemo, kaj al la faŝisma mankas unu el la ĉefaj ingrediencoj de homa boneco, nome sento. Ili estas sensentaj sistemoj. Mankas al ili ĉefe kunsento, kompatato, sento pri justeco kaj komunika komforto, konsidero al la bezonoj de tiuj, kiuj estas etaj kaj malfortaj, sento pri homa digneco kaj pri la rajto de ĉiu, egale kiom malriĉa aŭ neinteligenta tiu estas, renkonti iun, kiu aŭskultos kaj komprenos, iun, kun kiu eblos senprobleme komuni.

La tria sistemo estas la demokratia. Ĝi nomiĝas Esperanto. Kiel ĉio demokratia, ĝi havas multajn mankojn, multajn malperfektaĵojn. Sed ĝi tamen estas la plej justa, la plej efika la socie kaj psike plej kontentiga sistemo. Unuvorte, ĝi estas bona. Ĝi naskiĝis el sento de kompatato, el solidareco, el postulo al justeco kaj homa digneco. Jes, ĝi estas bona. Kaj tiel ĝi supervivos la aliajn. La burokrata sistemo kaj la faŝisma sistemo disfalos, ĉar mankas al ili la baza ekvilibro, sen kiu ne eblas daŭri. Pri tio ni povas esti certaj. Sed pri daŭro necesa por ke tiuj historiaj procezoj plenumiĝu, ni havas neniun ideon.

---

En sia libro „La Bona Lingvo“, Claude Piron analizas pli detale (sed same facile legeble) la bonecon de la lingvo Esperanto, el diversaj vidpunktoj.

### **Humanaj pensoj de niaj saĝaj antaŭuloj**

#### **Leonardo da Vinci (1452-1590)**

Prefere morti ol laciĝi! Neniam min ektodos servi, neniam min laciĝos esti utila.

#### **Jan Amos Komenský (1592-1670)**

Al kiu ajn utili vi povas, estu utila volonte, se eble al la tuta mondo. Servi kaj utili estas propreco de noblaj karakteroj.

#### **Charles Dickens (1812-1870)**

Neniu estas superflua en la mondo, kiu faciligas vivŝarĝon al iu alia.

#### **Albert Einstein (1879-1955)**

Nur la vivo, kiun ni vivas por la ceteraj, valoras.

### **Ludvík Lazar Zamenhof (1859-1917)**

Eĉ guto malgranda, konstante frapante,... la nepoj vin benos, se vi pacience eltenos.

## **ENHAVO de LEGOLIBRETO V.**

Kiu mi estos en mia venonta vivo, Eva Novotná.....	2
Sinjorino el Valečov, Zdenka Baboráková.....	2
Junuloj legu kion pri juneco opinias maljunuloj.....	3
Astrid Lingren kaj ŝiaj verkoj, Kerstin Rohdin.....	3
Fabelo el Tibeto, Marjorie Boulton.....	6
Du vazoj, ĉina fabelo.....	8
Kiel mi renkontis ĉeĥan libron en bazaro en Kalifornio, Lucie Zinke.....	9
Rakonto pri..., Myra Brooks.....	10
Reĝa rakonto, Bruno Ferrero Welch.....	11
Ĉeĥa pasko, Pavel Brom.....	11
Vatikana pano.....	12
Feministinoj verkas en interreto anonime.....	12
Pri mamzono.....	13
Ateisto sub ruĝanta luno, Sen Rodin.....	14
La vetero interesas ĉiujn, Aleš Vávra.....	15
Kion vi scias pri glaciaĵo? <a href="http://www.nadoma.cz">www.nadoma.cz</a> .....	16
Kion vi scias havante balotrajton?.....	16
Horlogiun Pragense, Pavel Brom.....	16
En fremda urbo, Arvo Valon, ero el la libro.....	17
El la libro „Eraroj de la science“, LucBürgin.....	21
Mi estas via donaco, Irena Obermannová.....	22
Imperiestro Konstantin, la viro, al kiu ni dankas pro libera dimanĉo.....	22
Mistero de malgranda subakviĝanto, Alena Millerová.....	23
Pri religio en Irano.....	26
Du fragmentoj el teatraĵo de Václav Havel „Forirado“.....	26
La plej malnova kaj maljuna esperantisto de la mondo.....	28
Kun dorsosako kaj Esperanto al Ĉuvaŝio, Arjen van Veelen.....	29
Komato.....	30
La vorto „kredo“.....	31
Sindikato kritikas reciprokajn obstaklojn de luita personaro el ekste.....	32
Ĉu vi volas elekti virinon prezidento? Do, ŝanĝu konstitucion!.....	33
Vikipedio.....	33
Ni ĉiuj estas fremduloj, Dr. Jiří Kučírek.....	34
Lingva opinio de flegistino.....	35
Ni lernu el eksjugoslavaj eraroj, Zlatko Tišjar.....	36
Vortoj de Giorgio Silber.....	37
Vortoj de Pavel Lehký.....	37
Alfred Nobel – nobelulo inter sciencistoj kaj lingvistoj.....	38
Vortoj de Karel Čapek.....	40

Vortoj de Zlatko Tišljár.....	41
Vortoj de Ludoviko Molnár.....	41
Verkisto fremda, Jan Stanisław Skorupski.....	42
La Esperanta Kulturo, Marcel Leereveld.....	42
Eŭropa identeco mallonge, Zlatko Tišljár.....	44
Unueco en lingva diverseco.....	45
Vortoj de Claude Piron.....	46

Kara leganto, verŝajne vi trovos en libreto erarojn. Ĝoju pri tio, ĉar vi estas pli sperta ol ni! Sendu viajn verkojn, verketojn al ni, ni ilin aperigos venonte..

[drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)